# Kiam Eŭropa Unio mortigas Europon

## 12 demandoj pri la « TRAKTATO STARIGANTA KONSTITUCION POR EUROPO » KIU ĈESIGAS LA EUROPAN MODELON

**Unité de Recherche,**
**de Formation et d'Information**
**sur la Globalisation (URFIG)**

**(grupo por esploro, klerigo kaj informado pri globigado)**
7, Place du Château – FR-66500 Mosset (France) www.urfig.org

Urfig

**kun korektoj de la referencoj listigitaj en paĝo 35**
Tradukis Pierre Bouvier, Denis-Serge Clopeau, Georges-Henri Clopeau
Europo = Eŭropa Unio Regiona Organizo Progreso

Kiam Eŭropa Unio mortigas  Europon

# ENHAVO

Enkonduko p.4

1. Kiu statuto por tiu teksto nomita « konstitucio » ? p.7

2. Ĉu La Konstitucio estas filozofie neŭtrala ? p.10

3. Ĉu La konstitucio estas ideologie neŭtrala ? p. 12

4. Ĉu La principo de popolo-suvereneco estas respektata en la proponita Konstitucio ? p.13

5. Ĉu La Konstitucio prezentas garantiojn por sendependeco kaj neŭtraleco de Europa Komisiono ? p.17

6. Ĉu la Konstitucio signas « antaŭen-paŝon » socialan ? p.19

7. Ĉu la Konstitucio ebligas ekziston de publikaj servoj ? p.22

8. Ĉu la Konstitucio garantias kapablon de Europa eksterlanda kaj defenda politiko ? p.24

9. Ĉu la Konstitucio protektas la europanojn kontraŭ nov-liberalisma globigado ? p.25

10. Kiel eblus modifi la Konstitucion en la estonteco ? p.27

II. Rilate la validaj traktatoj, per kiuj alineoj la Konstitucio kunportus pozitivajn trajtojn ? p.29

12. Kiujn konsekvencojn kaze de rifuzo de la proponita Konstitucio ? p.30

Konkludo : Timiga regreso, kiu kondukas al konservatisma restaŭro? p.32

Notoj: p.34

**Korektoj de referencoj por la lasta versio de teksto de projekto de Konstitucio** p.35

# ENKONDUKO

Mi estas nepeleble alligita al ideo de Europo. Pro tio, ke tiu ideo entenas modelon, kiu estas originala, unika, por strukturigo de homaj rilatoj. Ja en tiu eŭropa amplekso, naskiĝis samtempe postulo de individuaj rajtoj, kreantoj de liberecoj, sed ankaŭ postulado de kolektivaj rajtoj, kiuj organizas solidarecon. Tiu duopa postulo nenie kaj neniam estis, antaŭ ol ĝi estis starigita far la Eŭropanoj. Ĝi fundas Europon. Se Europo sen libereco ne estus Europo, Europo sen solidareco, ja ankaŭ ne estus Europo.

Mi elprovis, en libro eldonita antaŭ ne longe *(Europe, la trahison des élites, Europo, la perfido de la elitoj* Paris, Fayard, 2004 ), demonstri, per praktikaj ekzemploj, la hemiplegian kriplon de la tiel nomita « Europa konstruado». Ĉio favore al komerco, ekonomio, financo, nenio aŭ tre malmulte por socialo, fisko, vivmedio. Povoj pli kaj pli imponaj arigitaj en manoj pli kaj pli senkontrolaj. Traktatoj kaj direktivoj, kiuj favoras la apetiton de privataj profitoj sen prefero kaj eĉ sen protekto de ĝenerala intereso . Farmanieroj trudpremaj, arogantaj, egoistaj en la internaciaj traktadoj je eksklusiva favoro por la europaj mastroj kun neglekto de rajtoj de la popoloj.

La eldono de mia libro, en aprilo 2004, ricevis viglan intereson de la sociala movado. Mi estis invitita prelegi antaŭ multaj geaŭskultantaroj en Belgio, Francio, Luksemburgio. La definitiva teksto de la konstitucia traktato ne estis ankoraŭ adoptita kaj tiam nur estis konita tiu nomita de multaj « Konstitucio de Giscard ». La respondo pri kia ratifo procezo ne estis firme decidita en Francio. La europaj balotoj, tiam baldaŭaj vigligis la intereson pri europaj demandoj, eĉ se multaj anoncis intencon sindeteni. La pridemandoj de la ĉeestantaroj multis kaj debatoj estis tre diversaj. Mia partopreno surstrata kaj sur bazara, por kolekti subskribojn al peticio petanta organizadon de referendumo en Francio, por jesi aŭ rifuzi ratifon de la konstitucia traktato, ebligis al mi ricevi multajn pripensojn kaj demandojn.La kampanjo por re-elekto de Europa Parlamento estis ankaŭ aparte font-riĉa momento por la observanto. Mi persone estis stupora kaj konsternita pro la mal-scia prezento dum la kampanjo farita de ĵurnalistoj kaj politikaj elstaruloj pri la konstitucia projekto. Mirige, inter tiuj kiuj celas agnoskigi sin kiel preferanto de valoroj priskribitaj, tiaj de maldekstrulaj, kaj ĉe socialdemokratoj kaj verduloj, la zorgo dirigi al tiu projekto, kion ĝi ne diras kaj kaŝi kion li ja diras, tiu volo tromp-miksi la kartojn, atingis altegan ŝtupon konsternante tiujn, kiuj opinias ke debato ne malhelpas intelektan honestecon. La samaj pluigas sian laboron de misinformado en perspektivo de priratifa referendumo .

Ankaŭ, la baloto mem, kaj je ĝia sekvo, la konduto de la registaruloj kaj politikaj partioj nutris la pripenson. Inter 350.873.420 voĉdonantoj registrataj por la baloto de la Europa Parlamento, 201.401.343, t .e. 57,4% decidis ne voĉdoni. Sekve la 732 elektitaj deputitoj legitimiĝas dank al nur triono de la Europa loĝantaro. La civitanoj estas klarvidaj. Ili scias, ke maleblas por ili influi la Europajn decidojn. Ili scias, ke ili ne havas rimedon aprobi aŭ mal-aprobi la europajn komisarojn, kiuj disponas enormajn povojn, kiel tiu pri komerco, sola negocianto nome de 25 ŝtatoj en la traktadoj kun MOK (Monda oraganizo de komerco) kaj en ĉiuj internaciaj komercaj traktatoj, same kiel la komisaro pri konkurenco, kiu disponas kunlige de leĝo-povo, juro-povo, kaj decido-povo kaj ankoraŭ la komisaro pri interna merkato, kiu celas ĉesigi la esprimon de lokaj povoj kaj faligi la publikaj servoj en tuta Europo. Kia motivo delegi popolan legitimecon al reprezentantoj sen faktaj povoj super la plej potenca ekzekutivo de Europo ?

La registaroj kaj la politikaj partioj neglektis la analizon de la signo de tioma grava sindeteno. Ili fuĝis klarigon pri rifuzo de pli ol du cent milionoj da civitanoj, partopreni komedion de kava demokratio. La registaroj aprobis, post iometaj disaj ŝangetoj, la konstitucian traktaton, spite la balota debato, kiu ja monstris ke ĝi tute ne respondis la sopirojn de la popoloj.

Por prezidi la eŭropan komisionon, ili elektis la tiaman ĉefministron de portugalio, plenbatita per la balotoj de la 13-a de junio, homo, kiu korpigas iun konservatisman dekstrumon (lia sinteno kontraŭ la vir-virina egaleco kaj lia postulo de referenco al kristianismo en konstitucio), nov-liberalismon (partizano de ŝtato minimumigita, li puŝis al privatigo de san-sistemo kaj akvo-disdono ; il estis premiita kiel « Global Leader for Tomorrow » far la Monda Ekonomia Forumo de Davos), atlantikismon (li organizis ĉefulkunvenon en Açores insulo por la partizanoj de invado de Irako).

Unuvorte, la registaroj elektis por korpigi Eŭropan Union, iun tipon draste malproksima de la europaj valoroj. La politikaj partioj siajflanke plu uzas la misvalorajn farmanierojn, kiuj mal allogas al demokratio. La sociala-demokratio, post kampanjado por « sociala Europo », kiun ĝi ne konkretigis, kiam ĝi disponis la politikan povon, nun friponas kun la ĉefa dekstruma parlamenta grupo, la plej konstraŭstara al Sociala Europo, por disdoni nur inter si ĉiujn ŝlosilajn postenojn de la Europa Parlamento.

Cele al facilligo de pripenso pri dokumento malklara kaj diktroiga, aparte malfacile legebla kaj komprenebla, mi decidis respondi la demandojn plejofte aŭdatajn.

La instanca tuto nomita « Eŭropa Unio » reprezentas iun Europon, kiu ne vere kongruas

kun Europo sopirita kaj promesita antaŭ kvindeko da jaroj. Ratifi tian Konstitucion far la ŝatestroj kaj registarestroj okazigus fortiĝon, leĝiĝon kaj ĉiamigon de tia Europo, kiu estas malpli kaj malpli eŭropa kaj similiĝas pli kaj pli al Usona modelo.

La analizo, kiu sekvas, fondiĝas sur la versio ĝustigita provizora ( kun provizora nombrado) starigita far la sekretario de la inter-registara konferenco, post aprobo de la teksto far la ŝtatestroj kaj registarestroj, en Bruselo la 18-an de junio 2004 (CIG 86/04 de la 25-a de juinio 2004), dikigita de la ĝustigita provizora versio de la protokoloj aldonitaj al la traktato starigantaj Konstitucion por Europo kaj de illiaj aldonaĵoj I kaj II (CIG 86/04 ADD 1 ) kaj fine sur versio ĝustigita provizora de deklaracioj aldonitaj al la fina Akto de la inter-registara konferenco (CIG 86/04 ADD 2). Por kompreno de la referencoj, nepras scii ke la traktato arigas kvar partoj nombritaj (I, II, III, IV) kaj konsistantaj el artikoloj nombritaj per arabaj ciferoj.Kiam tiu cifero estas sekvita per komo, sekvita de alia cifero, tiam tiu indikas paragrafon pri kiu temas (ekz : I-51,1 ). Post la solena subskribo de la teksto far la estroj de registaroj kaj ŝtatoj en Rome la 29-an de oktobro 2004, komenciĝas la periodo dum kiu tiu Konstitucio devas esti ratifita en ĉiu el 25 ŝtatoj de la Unio. Tiu procezo de ratifo finiĝos la 1-an de novembro 2006.

La vetceloj de tiu elekto – diri jes aŭ ne pri tiu Konstitucio – tiom multe gravas por nia generacio, sed ankaŭ por la venontaj, ke respondecendas la civitanoj mem pri decido. Despli ke en neniu ŝtato la naciaj deputitoj ricevis mandaton per last-tempaj elektoj por strarigi Konstitucion. Kiam referendumo ne ekzistas en la nacia leĝaro, restas ebla organizi opini-konsultadon por esplori indikive la civitanaran opinion.

Mosset, 21-an de aŭgusto 2004

1

# KIU ESTAS LA STATO KAJ TRAFPOVO DE TIU TEKSTO NOMITA « KONSTITUCIO » ?

**1. Tiu « konstitucio » ne venas el konstituacianta asembleo**

Tio, kio nomiĝas Konstitucio en demokratio, devige referencas al konstrua procezo, per kiu la teksto starigata, kiel jura fundamento, heredas ĝian legitimecon.

Klasike Konstitucio fontas el publika debato sine de konsticianta asembleo mandatita por tiu celo kaj en kiu esprimiĝas la popolan volon. Ĉiufoje kiam la internacia komunumo, pere de UNO, ekvolas helpi popolon refondi ŝtaton, ĝia unua strebo konsistas en elektigo de konstitucianta asembleo, misiita por skribi Konstitucion.

Tiu demokratia nepro ne estis plenumita por la verkado de la Europa Konstitucio, kiu plejparte rezultas el laboro de kooptita grupo nomita : la Konvencio. Ties anoj ricevis neniun mandaton de la civitanoj voĉdonantoj por verki Konstitucion. La fina teksto submetita por ratifo estas nur rezulto de traktado inter la registaroj.

Do ni ne estas en demokrata procezo taŭga por verko de Konstitucio. Temas pri internacia traktato malĝuste nomita « Konstitucio ». La cirkonstancoj de verkado de la Europa Konstitucio ĉiel-e senigas ĝin je legitimeco kiel Konstitucio.

**2. Ĝi ne agnoskas la popolan suverenecon**

Kio estas Konstitucio ? Historie same por la insurekciintoj de Nova Mondo, kiel por la farintoj de franca revolucio, Konstitucio tradukas popolan volon ĉesigi aŭ malhelpi ĉian formon de arbitreco kaj agnoskas la pricipon proklamita kaj fakta dum laXVIII-a jarcento : *ĉiuj povoj venas de popolo.*

La proponita teksto, kontraŭe, revenas kvazaŭ al malhelaj epokoj, kiam la potenculoj, tiam fonto de legitimeco kaj povo favordonis tie aŭ tie ĉi pecojn de libero laŭ siaj plaĉoj … aŭ profitoj. Ĝi iel rememorigas malnovan reĝimon, kiam reĝo regis sur la subuloj laŭ « dia leĝo ».

**3. Ĝi ne estas teksto mallonga, klara, komprenebla por ĉiuj.**

Konstitucio difinas la kunvolon de iu volo kune vivi. Ĝi determinas la rajtojn kaj liberojn de gecivitanoj kaj organizas la pov-ilojn en la ŝtato, la amplekso de ĝiaj kompetentoj kaj la maniero per kiu ili interplektiĝas. Ĝi fiksas principojn, kiuj estas faktigitaj de leĝaro. Starigita kiel supera normo, ĝi entenas la procezojn de konformeco-kontrolo de la venontaj principoj. Pro tio tiu teksto nepre estu simpla, klara, preciza kaj mallonga. La teksto de la proponita konstitucio sen la aldonaĵoj entenas 453 artikolojn.

Ĝi estas kompletigita kun 36 Protokoloj, 2 Aldonaĵoj et 39 Deklaracioj. Entute 765 paĝoj ( A4 formato). En kelkaj kazoj, la kompreno kaj analizo de la Konstitucio postulas helpon de la protokoloj, Aldonaĵoj kaj Deklaracioj. La teksto estas tiel grave malklara kaj nekomprenebla, ke oni povis dum televida elsendo konstati mirigan spektaklon de du ĵuristoj, kiuj kvankam samsentemaj laŭ politika vidpunkto kontraŭ-argumentis pri analizo de iu aŭ alia artikolo de la teksto !

**4. Ĝi agnoskas la dominecon de la europ-skalaj decidoj**

Kial nomi « Konstitucio » europan traktaton ? La simbola impono estas forta, ĉar la Konstitucio, estas la arkitekturo de interna leĝaro, la supera teksto, tiu kiu sintrudas al ĉiuj aliaj tekstoj, kaj al kiu ĉiuj aliaj devas submetiĝi. Oni do intencas akceptigi tiun novan europan traktaton, kiel dominanta leĝo en la leĝaro de ĉiu lando.

Ja, la supereco de europa leĝaro fundas la principon de supernacieco jam skribita en la traktato de Romo en 1957 kaj konfirmita per du famaj juĝoj de la Kortumo de europaj komunumoj, kiu agnoskis la superecon de la komunuma leĝaro kaze de kontraŭ-staro kun la nacia leĝaro. Tiu supereco estas konfirmita far la artikolo I-5 bis de la proponita Konstitucio : « *La Konstitucio kaj la leĝaro adoptitaj far la institucioj de la Unio kadre de la kompetentecoj , kiuj estas por ili agnoskitaj, havas superecon super la leĝaro de la ŝtato-membroj* ». Eĉ regularo adoptita far la Komisiono havos superecon super la Konstitucio kaj la leĝaro de la ŝtato-membroj.

**5. Ĝi ŝtonigas per konsitucia normigo tion, kio dependas kutime de politikaj kuntekstaj elektoj**

Konstitucio vortigas principojn, kiuj trudas sin al ĉiuj aliaj normoj (leĝoj, dekretetoj, juĝoj, ktp). La maniero por efektivigi ĝin ne estas entenendaj de ĝi. Spite tio, la proponita Konstitucio ege preterpasas. Ĝi formulas kiel kvazaŭ principoj tion, kio devas esti je nivelo de leĝoj eĉ malpli je nivelo de regularo. Ĝi enskribas devigajn celojn, kiuj ne estas konstantaj karakteroj de socio, sed konjunkturaj opcioj, laŭ partizanaj preferoj, kiujn la voĉdonantoj aŭ cirkonstancoj modifas.

Tiel ekzemple mal-esencas por Konstitucio starigi kiel *« fundamenta libereco »* , la principojn devigantaj la liberan lokigon kaj liberan veturadon de personoj, servoj, varoj kaj kapitaloj (art I-4) kaj plie difini la aplik-manierojn (III-18 / III-65), ankaŭ mal-esencas fiksi la detalojn por polica kaj jura kunlaboro (III-170 / 178), kiu ne povas restadi senŝanĝa, ankaŭ anonci limigon de la eksponencialan kreskon de kamiona transportado (III-137), ankaŭ mal-esencas dekreti, ke la komerca komuna politiko devas kontribui al senigo de limigoj pri rektaj eksterlandaj investoj (III-216). Ensikribante tiajn punktojn en dokumento, kiun oni ligas al konstitucia valoro, oni provas trudi elektojn, kiuj apartenas al agado de leĝo-farado, kaj kiuj plie ne povos esti malagnoskitaj far universala voĉdono. Pri fakoj ŝanĝemaj, foje debataditaj, la Konstitucio trudas decidojn, kiuj ne plu estos diskuteblaj. Tiel farante ĝi damaĝas demokration.

**6. Ĝi ne determinas la limojn de Eŭropa Unio**

Klasike Konstitucio difinas la teritorion, kie ĝi kompetentas. En tiu ĉi, neniu alineo traktas la teritorion. La Konstitucio ne difinas la limojn, de tio kio ĝi nomas « Eŭropa Unio »: « Eŭropa Unio estas malfermita por ĉiuj eŭropaj ŝtatoj » (I-1,2 et I-57), sed neniu difino pri kio estas « eŭropa ŝtato ». La proponita Konstitucio nur listigas la subskribitajn ŝtatojn (IV-4,1). Tiuj, kiuj proponas aldonon de Libano kaj Israelo, eĉ plie la landoj el Magrebo, povas daŭrigi sian klopodojn por sorbi la Europan Projekton je granda zono avantaĝa nur por liberalisma interŝanĝo.

**7. Ĝi forĵetas koncepto de europa civitaneco krom se ligita per naci-ŝtata civitaneco**

La Konstitucio ignoras la agnoskon de unu eŭropa popolo, kvazaŭ por eskapi agnoskon de suvereneco de tiu popolo. Ĝi donas difinon de europa civitaneco (art. I-8) tre malpotenca, kaj tiel konfirmas, ke la povoj venas ne per manoj de popoloj sed fontas de ŝtatoj

La europa civitaneco restas ligita al nacieco en ŝtatomembro, kio sekvigas neadon de ricevebleco de europa civitaneco pro restado de tiuj, kiuj daŭre restintus sur la europa teritorio. Konsiderinde estas ke europa civitaneco difiniĝas per la politikaj rajtoj, agnoskitaj far la Unio sur la europa teritorio kaj ne fontas el nacia identeco. Kial konforme kun tiu difino, ne agnoski tiujn rajtojn al tiuj eksterlandevenaj personoj, kiuj de longe restadis sur le europa grundo, kaj tiel ĉesigi diskriminacion kontraŭ ili kaj kongrui kun la diversaj progresoj ĉirilataj en la diversaj prinacieco-leĝoj de la ŝtatoj-membroj?

**8. Ĝi ne protektas la regionajn kaj lokajn povojn**

Pro tio ke centralizigita Europo ne kongruas kun la realeco de Eŭropo, nepras starigi faktan subsidiarecon (por mastrumi ĉiujn necesaĵojn je la plej efika nivelo : komunumo, asocio, provinco, departemento, regiono,ŝtato, Europo. Tio postulas la difinadon por ĉiu pov-nivelo de la kompetentecoj por malhelpi, ke Europa Unio povos ŝanĝi la lokajn kaj regionajn pov-devojn tiel, kiel la europa Komisiono deklaras intencon per dokumento IP/02/II80 de la 31-a de julio 2002. La proponita Konstitucio ne agnoskas la ekziston de regionoj krom jes per aludo al konsulta komitato nomita « K*omitato de la Regionoj* » (art I-31,2) kiu, kvankam ariganta elektitulojn, ne estis ĝis nun aŭskultata de la Komsiono nek de la Konsilio, nek de la Parlamento. Plie la komunumoj estas tute ignorataj de tiu konstitucio. La regionoj same kiel la komunumoj fondas la realon de Europo. Ili estas enradikigitaj profunde en ĝia historio la plej malnova. Por resti ŝirmata de arbitro de la europa Komisiono, ili nepre estu agnoskitaj en tia teksto, kia estas teksto dediĉita al konstitucia rolo.

Ĉu sekve de ĉio ĉi supre, temas pri Konstitucio je senco klasike adoptita en la publika juro ?

Neniel !

2

# ĈU LA KONSTITUCIO ESTAS NEŬTRALA FILOZOFIE ?

En 2003, la Vatikano kaj kelkaj registaroj, kiuj ne surprizige estis inter la plej nov-liberalismaj (Hispanio, Irlando, Italio, Polio kaj portugalio)premis por trudi eksplicitan referencon favore al kristianismo kiel fundamenta valoro de Europo. Tiu agado, kiu ricevis atenton de la amasmedioj, kaŝis aliajn decidojn pli danĝeraj traktantaj la rilatojn inter la kultoj kaj publikaj povoj en Europo. Dum la distr-atentigoj pri fundamentaj valoroj, oni mutis pri la principo de laikeco de Europo, sola kunteksto por trankvila kunvivado inter kredantoj ka nekredantoj.

En moderna ŝtato, respektanta la principojn proklamitaj en la Universala Deklaracio de Homaj rajtoj, en la internacia pakto pri ekonomiaj, sociaj, kulturaj rajtoj kaj en la internacia Pakto pri civitanaj kaj politikaj rajtoj, konstitucio havas devigon garantii neŭtralecon de la publika kampo, kiel nemalhavebla kondiĉo por apliko de rajto « ĉiu persono disponas liberon je penso, konscio kaj religio » (artikolo 18-a de la Universala Deklaracio).

Ĉu la proponita Konstitucio portas tian garantion pri neŭtraleco ? Du artikoloj dubigas pri tio :

a) La artikolo II-10 proklamas la rajton de ĉiu persono pri libero de penso, konscio, religio. Tio ni ja devas aprobi.Sed la sama artikolo plu precizumas : « *Tiu rajto implikas por persono la liberon (…..) manifesti sian religion, aŭ konvinkon, sole aŭ grupe, publike aŭ private, per kulto, instruado, pratikado kaj elfarado de ritoj».* Temas pri dispozicio, kiu forviŝas la ideon de neŭtraleco de publikaj lokoj kaj domoj kaj de la deĵrantoj en publikaj postenoj. Tiel formulita la religia libero konsekras la fortan revenon de religio en la publikan sferon.

b) La artikolo I-51,1 afirmas: « *Unio respektas kaj ne prijuĝas la starstaton, kiu favoras laŭ nacia leĝaro, la eklezioj, kaj la asociojn aŭ religiajn komunumojn en ŝtatomembroj ».* Tio sekvigas ke, Unio konsentas pri la naciaj dispozicioj organizantaj la rilatojn inter la religiaj grupoj kaj la publikaj pov-instancoj. Dua paragrafo prezentas saman dispozicion pri la « filozofiaj *kaj ne konfesiajorganizaĵoj»* Sed la paragrafo 3-a de tiu sama artikolo aldonas « agnoskante *ilian identecon kaj ilian apartajn kontribuojn, la europa Unio plutenos dialogon sinceran, videblan kaj regulan kun tiuj eklezioj kaj organizaĵo.* »

La ŝajn-glata karaktero de tiu formulo ellasas fakte gravegan decidon. La Konstitucio forpuŝas la principon de laikeco de la europaj institucioj kaj trudas specifan rilaton inter la eklezioj kaj la ŝtatoj : tiu de agnoskita kulto. Tia rilato enkondukas tre precizajn implikaĵojn, kiel la eblon por publikaj povoj subvencii tiujn ekleziojn agnoskitaj kiel partneroj de la publikaj povoj.

Tiu artikolo I-51, kies inspiron troviĝas en deklaracio (n°II) aldonita al traktato de Amsterdamo, konstituci-igas arbitrecan praktikon de la europa Komisiono, inaŭgurita dum prezidado de Delors kaj pluigita far tiu de Santer kaj Prodi , kiu konsistas el donado de publika mono al ekleziaj organizaĵoj kiel Opus Dei. Tiu aktikolo I-51 kontentigas la petojn esprimitaj far Joseph Homeyer, Episkopo de Hildesheim kaj prezidanto de espiskopa komisiono, dum la laboroj de la Konvencio de la europa Komunumo. Li petis la dialogon anoncitan en paragrafo 3, sed ankaŭ iu « *antaŭ-leĝan* konsultadon . » La proponita europa Konstitucio nuligas jarcentojn de luktoj por sendependigi ŝtatojn kaj ekleziojn. En tiu epoko, kiam renaskiĝas religiajn maltoleremojn, sekvantaj la streĉojn por rekonkero de la publika sfero far la eklezioj, tiam ve la Konstitucio agnoskas tiun regreson. Kiel kongruigi la dominon de tiu Konstitucio stariganta principon de « agnoskitaj kultoj » kun la artikolo 1 de la franca Konstitucio, kiu afirmas, ke Francio estas laika respubliko ?

3

# ĈU LA KONSTITUCIO ESTAS NEŬTRALA IDEOLOGIE?

Iuj konstitucioj estas neŭtralaj, dank al tio, ke ili lime restas en kampo de organizado de disdono de povoj kaj listigo de rajtoj kaj devoj de la civitanoj. Aliaj – la pli modernaj- agnoskas la ekziston de rajtoj individuaj kaj de rajtoj kolektivaj kaj ŝuldigas la publikajn povojn pri plena garantio de efektivigo.

La projekto de europa Konstitucio donas juran ag-ul-econ al la Unio ricevinta la povon kunordigi la leĝarojn de la ŝtato-membroj (art. I-1,I-5 kaj I-5bis), celante respektigi la devigojn por garantii sendiskriminacie, « *la liberan veturadon de personoj, posedaĵoj, servoj, kapitaloj, kaj ankaŭ tiel, la liberecojn pri lokigo kaj investo»* (I-4,I-3,2).

La rajtoj kaj devigoj rilatantaj al fundamentaj rajtoj de personoj ne estas garantiataj far la Unio, pro tio, ke ĝi ne limigas tiun « *liberan veturadon ktp* » (I-4, I-5, Il-Enkonduko, II-51, II-52). Tiel , la elitoj starigis novan hierarkion de la valoroj, kiu agnoskas la superecon de konkurenco super solidareco.

Neniu el la kvin traktatoj afirmis tiel forte tian ideologian projekton, kiu spinumu la europan konstruon : la konkurenco estas fonto de fortoj. Plurfoje, la teksto afirmas, ke la Eŭropa Unio fondiĝas sur « *la respekto de principo de merkata ekonomio, kie la konkurenco estas libera kaj ne falsita* » (art. I-3,2,III-69 et III-70), plie ke Europa disvolviĝo fondiĝas sur merkata ekonomio « *halt-grade konkurenciva* » (art. I-3,3). La fakto, ke tiu ekonomio estas kvalifikita, « sociala », havas neniun sencon pro tio, ke la difino de sociala minimuma helpo malĉeestas en la teksto. Pli klarige, krom en artikolo I-3,3, la adjektivo « sociala » ne plu kvalifikas la merkatan ekonomion en la ceteraj artikoloj, kie ĝi estas priskribita (III-69,III-70,III-77). La konkurenco inter individuoj estas fundo de homaj rilatoj.

La liberalisma interŝanĝo eniras neformeteble la « komunan intereson» de la Europanoj (art. III-69 / 71). La absoluta super-rego de la merkato ne plu estas opcio submetinda al civitan-voĉdonoj. Ĝi iĝas defenitive komuna heredaĵo, ne plu diskutebla.

La proponita Konstitucio agnoskas kiel triumfo la monismajn dogmojn, kiuj ja jam okazigis katastrofojn en pluraj landoj. La centra europa banko (CEB) eskapas al ĉiuj regoj (I-29,3 et III-80). Ĝia prioritata misio estas certigi neŝanĝemon de prezoj (I-29,2). La proponita Konstitucio favoras la privatajn bankojn kaj malpermesas al la CEB atribui kreditojn al publikaj instancoj, kiuj estas konstitucie devigataj pruntpeti ĉe pivataj bankoj (III-73).

Oni kredas sin en reva mondo de Thatcher kaj Reagan ! **Ĝi ne estas Konstitucio , sed Manifesto de nov-liberalismo!**

4

# ĈU LA PRINCIPO DE SUVERENECO DE POPOLO ESTAS AGNOSKITA EN LA PROPONITA KONSTITUCIO ?

ĈU la Konstitucio fortikigas la demokratan karakteron de la europaj institucioj, reage al preskaŭ kvindek lastaj jaroj de « konstruado de Europo », kiuj realigis faktan malfortiĝon de ilia demokrata funkciado. ?

La fundo de Demokratio estegas en popola suvereneco. Por ke ŝtato estu demokrata nepras, ke estu agnoskita en ĝia Konstitucio kaj estu kontrolita, ke ĉiuj povoj venas el popolo KAJ DE LI SOLE. La popolo estas unika fonto de aŭtoritato. Sen tiu principo, neniam Demokratio.

Decidinte transdonon de kompetentoj, ĉiam ĝis nun mastrumitaj en teritorioj, kie tiu principo realas, al laŭdire supra-nacia kadro, kie dum dekoj da jaroj oni neglektis aplikon de tiu principo, oni okazigis regreson de la demokrata praktiko. Ĉiuj observantoj konsentas pri tio. Ili eĉ ekuzis esprimon pruntita de kont-tenada vortaro por esprimi tiun fenomenon : « demokrata deficito ». Ĉiuj registaroj silente akceptis la fakton kaj plu-plue.

a) 25 popoloj submetitaj al Komisiono kaj ministra Konsilio neniel regateblaj.
La proponita Konstitucio konfirmas kaj fortikigas la koncentriĝon de povoj al arigo de ministro-konsilio (t.e estas hodiaŭ 25 registaroj, morgaŭ 27 eĉ 28) kaj de la Komisiono. Kompense al tiu povo-koncentriĝo, por krei nepran ekvilibron, necesintus agnoski ekziston de europa popolo ja suverena kaj ebligi, ke ĝi estu reprezentata per aŭtenta Parlamento. La Konstitucio ignoras tion. Je tiu stato de koncentriĝo de la povoj volita de la europaj instancoj,… kiom pezas la suvereneco de tiu popolo, kiu restas dispecigita en 25 unuoj, despli senkompetentigita pro la pov-transdono al europa Unio ?

La ne-evitebla tensio ekzistanta inter regantoj kaj regatoj sine de ŝtato estas akrigita pro tio, ke ĉiu popolo frontas decidojn, faritaj ne nur de sia registaro sed de koalicio ariganta 25 registarojn kaj Komisionon neniel submetitajn al ĝi.La ekvilibro pene atingita kaj ĉiam rompiĝema en nacia kadro ne estis atentata je europa nivelo. La ekvilibro estas rompita kaj demokratio sekve malfortikigita.

Plie maleblas kolektive sankcii la ministran konsilion, kiu estas la europa instanco ĉefe decido-povanta. Tiu kolegio respondecas nek antaŭ la europa Parlamento nek antaŭ la naciaj parlamentoj.La Konstitucio mistraktas la ideon mem de demokratio: ĝi afirmas, « la eŭropa Unio fondiĝas sur la valoroj de demokratio « (art. I-2) , sed forpuŝas la fundan kondiĉon de iu ajn demokrata sistemo : la unika fonto de suvereneco estas la popolo.

Oni klarigos al ni, ke la konsedirindaj povoj de la europaj institucioj venas malrekte tamen de naciaj elektitoj. Jes ja, la popoloj delegas suverenecon al elektitoj, kiuj delegas ĝin al registaroj, kiuj delegas ĝin al la europa ministra Konsilio, kiu delegas parton de ĝi al la Komisiono, kiu ne responsas antaŭ la popoloj. Kiam la delegado transdoniĝas vice tiel kvarfoje, oni ne plu estas en demokrata sistemo. Tiel restas nur ŝajnaĵo de demokratio. La delegado tiel troigita iĝas ilo de solvado de popola suvereneco kaj de demokratio.

Plie la proponita Konstitucio organizas transiron de demokratio al teknokratio. En la artikolo I-25, ĝi konfidas al la Komisiono, kiu estas ne responsiva aro da teknokratuloj je servo de negocoj, la gardon de « ĝenerala intereso » kaj « eksteran reprezenton de la Unio».

**b) reformetoj kiuj ne riparas la malantaŭiron de demokratio.**

La « demokrata deficito » restas tre malproksime de riparo per la kvar novaĵoj de tiu proponita teksto, kiuj estas prezentitaj kiel grandaj demokrataj progresoj laŭ deklaroj de tiuj, kiuj volegas allogi al tiu proponita Konstitucio:

1. La rajto de peticio (art. I-46,4). Unu miliono da europaj civitanoj *« povas iniciati inviton de la Komisiono kadre de ĝiaj kompetencoj, submeti taŭgan proponon, pri kazoj, pri kiuj la gecivitanoj konsideras, ke jura ago de la Unio nepras por apliko de la Konstitucio »* Tiu civitana iniciat-povo estas tute limigita per la enhavo de la Konstitucio. La Komisiono traktas la rezulton laŭ sia plaĉo. Nenio indikas, ke ĝi donos sekvon al tia ajn peticio. Tio signifas ekzemple, ke se unu miliono da civitanoj petus, ke la akvo-disdono ne estu privatigita. Kondiĉe, ke oni agnosku post longa batalo, ke tiu demando entenitas en la kadro de la Konstitucio, tiu peticio povos esti enrubujigita far la la Komisiono pro ĝia prefero kun subteno de registaroj por privatigo de tiu akvo-disdono. Jen bela ekzemplo de misinformo, kiun lanĉas la partizanoj de tiu projekto de Konstitucio. S-ro Noëlle Lenoir, tiama franca ministrino delegita por europaj aferoj de la registaro Raffarin II, ridinde proklamis : « *sufiĉos arigi unu milionon da subskriboj en Europo por devigi la Komisionon ekigi juran procezon* [1] *».* Temas ja pri mensoga prezento, ĉar estas ja nenia devigo por la Komisiono. En pli milda versio de trompo, la verduloj kredigas ke « *unu miliono da civitanoj povus per peticio proponi eŭropan leĝon*». Estas trompo. La teksto klarigas ke temas pri « *propono pri demandoj pri kiuj la gecivitanoj konsideras, ke jura ago de la Unio nepras* » Inter doni leĝan iniciato-povon, kiel kredigas la francaj verduloj kaj submeti proponon al arbitreco de la Komisiono, estas granda diferenco. Plie nenio permesas afirmi, ke peticio kondukos aŭtomate al leĝo. La Konstitucio aludas pri « *jura ago* ». Fakte, la difino de la juraj aktoj donita en artikolo I-32 klarigas, ke la regularo, la decido, la rekomendo kaj la sciigo estas juraj agoj. Rimarkendas, ke la Interregistara Komisiono ŝanĝis la formuladon de tiu dispozicio, tiel ke senco nebuliĝas kaj lasas amplekse libervola ĝian interpretadon fare de la Komisiono por trakti peticion. Ni bedaŭru same ke la Konstitucio ne starigis je europa nivelo la eblon de referendumo. T.e. popola konsulto kun trud-povo, kiu estus utila unuavice por adopto kaj revizio de la Konstitucio. Des pli ke en artikolo I-1. ĝi proklamas sin sub « la volo de la civitanoj por konstrui komunan estontecon ». Volon, al kiu oni referencas sed kiun oni mutigas.

2. La procezo de elekto de la europa Komisiono. Iuj ne hezitas afirmi, ke ĝi fontos el « *universala voĉdonado* ». Jen troiga dirigo de la tekstoj. Kio estas precize ? La ŝajna elektado de prezidanto de la europa Komisiono far la parlamento estas simi-ŝerco de demokratio, ĉar tre precize

la art.I-26,1 asertas : « la Ministra Konsilio, decidante per pondita majoritato, proponas al Eŭropa Parlamento kandidaton por prezidenta ofico ». Tiel, unue la registaroj elektas, poste la Parlamento estas petita sankcii. Se ĝi rifuzas –tiel li rajtas—la registaroj devas proponi alian kandidaton. La sola novaĵo estas : la registaroj devas kalkuli kun la rezulto de la balotoj, t.e. ili devas elekti kandidaton akceptota de la majoritato de la Parlamento. Koncerne la aliaj Komisaroj, ili estas proponitaj de tiu Prezidento al la registaroj, kiuj estiel lastaj instancoj akceptas aŭ rifuzas la prezentitan liston. La parlamento aŭdadas la kandidatojn laŭ procezo, kiu similas la aŭdadojn de la USA-Kongreso, kaj fine sankcias la elektadon. Praktike, estas starigita por dungado en la Komisiono specon de kundecido de registaroj kaj Parlamento. Sed oni trompas la Europeanojn asertante ke tiel la Komisiono estas naskita de la Universala Voĉdono. Se tio estus, ĝi ankaŭ responsus antaŭ la europaj gecivitanoj. Tio ne estas.

3. La plimultado de la aferoj pri kiuj la Parlamento partoprenos en la procezo por kundecido.
Jes ja, tiu plimultado estas realaĵo. Estis 37, estos proksimume 80. Sed la Komisiono konservas la monopolon de iniciato : « Leĝdona akto estas adoptenda nur laŭ propono de la Komisiono, krom kiam la Konstitucio alimaniere indikas » (art.I-25). Ankaŭ la Europa Parlamento ne ankoraŭ rajtas proponi leĝtekstojn, kvankam temas pri funda funkcio de la parlamenta institucio.

4. La ebleco por triono de la naciaj parlamentoj (9 inter 25) trudi la Komisionon rekonsideri iun el siaj proponoj, kiam ĝi koncernas fakon dependantan de la « akcesoreca principo ». Sekve necesas ke tiuj 9 naciaj parlamentoj plendu antaŭ la Europa Kortumo. Oni komprenas ke politika elekto kontraŭanta la Komisiono kondukas al enŝlimiĝado en juraj procezoj, kaj fine dronos.

5. La publikado de la kunsidoj de la Ministra Konsilio, kiam ĝi agas kiel leĝfaranto (art. I-23,5 k. I-49,2)
Laŭsekve, la ministra konsilio devos publike kunveni, kiam sia tagordo koncernos nur adopton de europa leĝo. Oni celas kredigi, ke temas ja pri demokrata trarompo, iĝigante la Ministran Konsilion al speco de parlamento. Sed la konfuzo, tiel sugestita inter la propra inter-registara rondo kaj la parlamenta funkcio, montras la limojn de tiu demarŝo. Tio sukcesos nur kaŝi la idéologiajn aŭ politikajn kontraŭstarojn sub la ŝtataj konstraŭstaroj.

**c) Europa Parlamento, kiu apogas sen regadi**
Sen minimumigi la gravecon de la plimultado de la aferoj pri kiuj la Parlamento partoprenos, oni devas konfesi, ke tiuj reformetoj ne sukcesas kaŝi la konstantan malfortecon de tiu Parlamento kompare al la fundaj postuloj de demokratia sistemo.

Historie, la parlamentaj asembleoj estis kreitaj por voĉdoni la enspezojn kaj la elspezojn . Poste ili faras la leĝojn. Kaj en la plej antaŭiĝintaj sistemoj, ili regas la ekzekutivan potencon. Kion povos la europan Parlamento se tiu Konstitucio estas ratifita ?

Legante la art.I-19,1, ŝajnas ke la konstitucio kreas aŭtentikan parlamenton : « La Europa Parlamento regas kun la Ministra Konsilio la leĝ-faradon kaj la buĝeton. Ĝi kontrolas la politikojn kaj la konsultadojn. Ĝi elekas la Prezidenton de la Komisiono » . Tiu art., donas al ni taŭgan ekzemplon de tiu okultrompa demokratio, kiun la proponita Konstitucio ofertas. Oni ĵus legis, ke la Parlamento elektas la Prezidenton de la Komisiono. Kvankam oni jam vidis ke la art. I-26,1 indikas, ja ke la registaroj elektas la kandidatojn al Prezidenteco.

Tio, kion la Konstitucio ŝajnas starigi tie, ĝi malkonfirmas aliloke. Tiel, estos ĉiam trovebla ebleco dirigi per tiu dokumento tion, kion ĝi ne diras, aŭ prisilenti tion, kion li diras. Tiu ambaŭsenceco, kiu estas pri la elektado de la Prezidento, ankaŭ estas pri la parlamenta potenco :

Ĉu la Parlamento elektos la enspezojn de la Unio ? Ĝi ne difinas la specojn de taŭgaj enspezoj de la Unio. Ĝi nur donas opinion pri la proponoj de la Komisiono. Kontraŭe, la manieroj por kolekti la rimedojn, proponitaj de la Komisiono, estas trude aprobitaj de la Parlamento. Fakte, ĉar ne estas europa fiska regularo, la potencoj de la Parlamento pri tio estas tre malgravaj. Ĝi tute ne povas kontraŭi la fiskan fraŭdon aŭ la fiskan dumpingon iĝintaj tre ampleksa realaĵo pro la plivastigado de la Unio.

Ĉu la Parlamento aprobos la buĝetojn de la Unio ? La buĝeto estas pretigita de la Komisiono kaj aprobita de la Ministra Konsilio. Poste, ĝi estas proponita al la Parlamento, kiu ĉu aprobas ĝin tia kia ĝi estas, ĉu amendas ĝin. Okaze de amendoj, necesas ke pri la modifoj, la Ministra Konsilio kaj la Parlamento akordiĝu por ke la maloftaj plibonigaĵoj estos aprobitaj. Tio estas unu el la maloftaj plibonaĵoj, kiu venas dank la Konstitucio, ĉar la Parlamento sin esprimas pri la tuta buĝeto.

Laŭ kioma proporcio la Parlamento estos leĝdonanto ?. Ĝi neniam estos nura leĝdonanto. Ĝi estos, pri pli multe da aferoj, kunleĝdonanto. Sed ni konfesu, ke temas pri ordinara karakterizaĵo de la parlamenta demokratio. Maloftaj estas la kazoj –eĉ se ili ekzistas—kiam iu parlamento trudas tekston kontraŭ la opinio aŭ sen la konsento de la registaro. Tio, kio grave malfortigas la Europan Parlamenton, aparte pri leĝdona potenco, estas ke ĝi malrajtas proponi siajn proprajn tekstojn pri iu ajn temo. Ĝi povas peti de la Komisiono, ke tiu-ĉi proponu al ĝi tekston, sed la parlamentanoj ne povas proponi debaton pri tekstoj, kiujn ili verkis. Aliparte la parlamento ne rajtas leĝ-fari pri serio da aferoj pri kiuj nur la Ministra Konsilio rajtas leĝ-doni. Tiel la Parlamento estas reduktita al asembleo, kiu apogas la elektojn de la ekzekutiva potenco,.

Ĉu la Parlamento fake regos la politikajn elekojn kaj la funkciadon de la aliaj europaj institucioj, precipe de la Komisiono ? Pri tiu temo, la Europa Parlamento restas eksterordinare malforta. Fakte, la Konstitucio aldonas neniun novaĵon al la antaŭaj traktatoj. La Parlamento povas kontroli la konformecon de la agoj de la Komisiono, kaj enketi pri administradaj kulpoj. Ĝi ne povas orienti la politikajn elektojn proponitaj far Komisiono kaj aprobitaj de la Ministra Konsilio. Ĝi ne povas eksigi eĉ ne unu Komisaron. Se ĝi opinias, ke ĉiuj kondiĉoj estas kunigitaj por sankcii Komisaron, ĝi estas devigata eksigi la tutan Komisionon. Por tion fari, ĝi devas disponi du majoritatojn : du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kaj duono de la Parlamentanoj (III-243).La Komisionon, kiu ja zorgas pri politikaj aferoj, la Parlamento ne politike voktas. Tiuj limoj permesas multegajn manovrojn de la komisionanoj, kiuj ne emas klarigi sian kondukon. Aliparte, pri tion ja la kvin saĝuloj emfazis en la raporto, kiun ili aldonis ĵus antaŭe la demisio de la komisiono SANTER :**« Iĝas malfacila ektrovi iun, kiu eĉ iomete sentas sin responsa »**. Fakte, la tuta institucia sistemo kriziĝas.

Bedaŭrinde, nur unu konstato evidentiĝas : ju pli antaŭas la europan konstruadon des pli malantaŭas la observadon de la demokrataj principoj. La Europa Parlamento, fraŭde prezentita, kiel ilo de la popola suvereneco, estas nur semioŝerco de parlamenta institucio.

5

# ĈU LA KONSTITUCIO PREZENTAS GARANTIOJN POR SENDEPENDECO KAJ NEŬTRALECO DE LA EUROPA KOMISIONO ?

*LA demokrata evoluo ekigita dum la XIIIe jarcento instigis ĉiun ŝtaton interne organizi bone malbone la necesajn ekvilibrojn por ke kontraŭ ĉiu influo estu mala influo, celante privilegii la komunan profiton. Laŭ la fama formulo : « necesas ke potenco haltigas potencon ».*

Kutime, oni taksas la progresojn de la europa integriĝado, laŭ la grado de sendependeco donita al la laŭdire komunecaj institucioj, t.e. ĉefe la europa Komisiono. Oni diras ke ju pli ĝia grado de memregado kreskas, des pli la integriĝado antaŭas. Sed oni konsideras nur la memregado de la Komisiono rilate al la europaj ŝtatoj. Oni neniam interesiĝas pri la memregado de la Komisiono rilate al la premgrupoj. Oni ne multe zorgas pri la rolo de la Komisiono kiel defendanto de la komuna profito. Ĉu tiu rolo estas fakte plenigita ? La observado de la faktoj elmontras la malon.

La proponita Konstitucio asertas ke *« la Komisiono antaŭigas la komunan profiton kaj taŭge iniciatas tiun celon »* (I-25,1) kaj *« tute sendependece prenas sur sin la prirespondecojn »* kaj ĝiaj membroj *« nek petu nek akceptu instrukciojn de iu ajn registaro, institucio, organo aŭ organismo »* (I-25,7).

Nu, same kiel mi elmontris en mia libro : *« Europo, la perfido de la elitoj »,* la europa Komisiono estas la ekzekutivo la plej penetrebla de la negocaj rondoj, kaj de la patronaj premgrupoj. Ĝi estas la europa politika brako de la privataj kaj de la financaj organismoj. Sufiĉas kompari –tion la amasinformiloj neniam faras— la proponojn de tiuj rondoj kun la proponoj de la Komisiono. Sufiĉas rimarki – tion la amaskomunikiloj preskaŭ neniam faras – la dirojn de la europaj komisaroj kiam ili estas invititaj ĉe la tribuno de tiuj patronaj premgrupoj aŭ kiam ili sin esprimas interne de la OKED, la IMF, la Monda Banko aŭ la OMK.

Ne eblas konsenti ke la Komisiono *« antaŭigas la komunan profiton »* kiam siaj membroj promesas al la patronaro sekvi iliajn rekomendadojn. Ekzemple, la Komisaro por la komerco en la Komisiono PRODI, la franca socia-demokrato Pascal Lamy, deklaris antaŭ la asembleo de unu el la plej potencaj premgrupoj en la negoca dondo, la TransAtlantic Business Dialogue (TABD) : *« La fidaj rilatoj kaj la interŝanĝoj pri informoj inter la negoca rondo kaj la Komisiono neniam estos multaj. (...) Ni konsentas strebadon por ellabori viajn rekomendadojn en la kadro je transatlantika ekonomia partneraj aferoj kaj, precipe, gravaj progresoj okazis en multaj kampoj pri kiuj vi altiris nian atenton. (...) Finaranĝe, ni laboros sur bazo de viaj rekomendadoj 5 »*

Estas ankoraŭ pli malfacile kredi la sendependecon de Komisiono, kiu petas instruciojn de la negocaj rondoj. La sama Pascal Lamy, antaŭ la samaj patronoj deklaris : « *Ni faros tion, kion ni devos fari des pli facile ke, via flanke, vi indikos al ni viajn prioritatojn (...) Mi opinias, ke la negoca rondo ankaŭ devas sincerece paroli kaj konvinki, ke la liberado de la komerco kaj por plejparto la globigadon estas bonaĵoj por niaj popoloj* [6]*...* »

Stranga sendependeco estas tiu de Komisiono, kies membroj intime rilatas kun rondoj tiel sekretaj kiel la Trilaterala komisiono aŭ la grupo Bilderberg, ekzemple ! En tiuj tre specialaj kluboj sin kunigas la plej potencaj negoculoj, bankestroj, pluraj politikaj decidantoj, universtatanoj, kelkaj ĵurnalistoj fame konataj pro ilia influo sur la amasopinio, kaj ankaŭ la ĝenerala sekretario de NATO, aŭ ankoraŭ la ĝenerala direktoro de la OMK.

Ili volas, kaŝitaj en mallumo, influi la politikajn decidojn kaj regi la mondon. Ili ne hezitas kontesti la demokratan ordon « *Io endas anstataŭi la registarojn kaj la privatan potencon ŝajnas al mi la taŭga ento por tion fari»,* deklaris David Rockefeller, fondinto de Bilderberg plie de la Trilateralo 7. Inter la ellaboraĵoj pri doktrino, kiuj inspiris la kampanjon por minimuma ŝtato, oni trovis raporton de

la Trilaterala komisiono titolita *The crisis of Democracy (la krizo de Demokratio)* en kiu oni povis legi : « *Estas dezirindaj limoj al la disvastiĝo de la politika demokratio* ». Tiuj du kluboj estas la veraj arkitektoj de la liberala globigado

La Prezidento de la europa Komisiono, Romano Prodi, estis membro de la direktada komitato de la grupo Bilderberg. Grava membro de tiu grupo estas eks-vic-prezidento de la Komisiono, la belga vicomte Etienne Davignon, grava forvendisto de la europa ŝtal-industrio, eks-prezidento de la Société Générale de Belgique, membro de la administra konsilio de tre multaj societoj Du el la plej gravaj membroj de la Komisiono Prodi, S-roj. Lamy et Monti, partoprenis la kunsidojn de la Bilderberg en 2001 et 2003. Monti estis membro de la direktada komitato de Bilderberg de 1983 / 1993. Aliaj membroj de la Komisiono Prodi estis partoprenantoj al ellaboraĵoj, ĉu de la Trilateralo (Pedro Solbes Mira, Chris Patten.) ĉu de la Grupo Bilderberg (Franz Fischler, Erikki Liikanen, Gunther Verheugen, Antonio Vitorino). José Manuel Barroso, la nova prezidento de la Komisiono, estas unu el la gasto de la Groupe Bilderberg en 2003.

Ĉu la Konstitucio kreas neakordiĝeblecon inter la funkcio de europa komisaro kaj la partoprenado en aktivecoj de grupoj kaj de influantaj retaĵoj, debatante malpublike pri planoj, kiuj celas submeti la ŝtatojn kaj la popolojn sub la tuta potenco de la privataj firmoj ? Neniel !.

6

# ĈU LA KONSTITUCIO REPREZENTAS SOCIALAN « ANTAŬENAN PAŜON» ?

LA ĝenerala Sekretario de la europa Konfederacio de la sindikatoj deklaris : « *la Konstitucio reprezentas antaŭenan paŝon por la laboristoj* » (Le Monde*,* 17/07/2004). Do estus progreso. Oni taksas progreson rilate al akiraĵo. Kia estas nia akiraĵo nun kiam tiu Konstitucio estas al ni proponita?

Nia akiraĵo konsistas el fondamentaj tekstoj t.e. la Universala Deklacio pri la Homaj Rajtoj, la internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, kaj la internacia Pakto pri la Ekonomikaj, Socialaj kaj Kulturaj Rajtoj. Nia akiraĵo ankaŭ konsistas el tekstoj adoptitaj en la kampo de la Internacia Organizado de la Laboro kiuj rezultis el traktadoj inter la ŝtatoj la patronaj organizaĵoj kaj la sindikataj organizaĵoj. Precipe oni pensas pri la ok fundamentaj socialaj konvencioj. Ĉiuj tiuj tekstoj estis demokrate subskribitaj kaj ratifitaj de ĉiuj ŝtatoj, kiuj estis membroj de la Europa Unio ĵus antaŭ la plialiĝado okazinta la unuan de majo 2004. Tiel grave fundamentaj estas la konstituciaj kaj leĝaj dispozicioj en ĉiu ŝtato membro de la Europa Unio. Nur pri tiu tekstaro eblas decidi ĉu jes aŭ ne estas « *antaŭiranta paŝo* » en la proponita europa Konstitucio.

La proponita europa Konstitucio indikas (I-7) ke la europa unuiĝo aliĝas al la europa Konvencio por savo de la homaj rajtoj. Ne estas indikita ke ĝi aliĝas al la Universala Deklaracio de la Homaj rajtoj, nek al la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, nek al la internacia Pakto pri la Ekonomikaj, Socialaj kaj Kulturaj Rajtoj. Kia diferenco ? La europa Konvencio kreas neniun kolektivan aŭ socialan rajton kontraŭe al la tri aliaj dokumentoj.

La proponita Konstitucio indikas nek ke ĝi aliĝas al la europa sociala Ĉarto subskribita en Turino la 18an de oktobro 1961, nek al la komuneca Ĉarto de la fundamentaj socialaj rajtoj de la laboristoj (1989). Ĝi nur mencias tiujn dokumentojn estiel ekzemploj, sen jesi, ke ili ŝuldigas la Unio. Kontraŭe, la teksto substrekas « *la neceso subteni la konkurencecon de la ekonomio* » (III-103).

La « Ĉarto de la fundamentaj rajtoj de la Unio », kiu plenigas la duan parton de la proponita Konstitucio kaj kiu estus devonta citi la fundamentajn rajtojn agnoskitaj al la virinoj kaj la viroj dum tiu komenco de la XXIe siècle, estas ĝuste nomita : Ĉarto – vorto kiu signifis, sub la Malnova Reĝimo, tekston favordonanta rajtojn koncesiitaj de la povenculoj Tie ankaŭ, la elitoj koncesas nur la rajtojn kiujn ili degnas agnoski al la popolojn

Sed pli grava estas ke ne nur la titolo, sed ankaŭ la enhavo signifas katastrofan iradon malantaŭen

Multrilate, la Ĉarto de la fundamentaj rajtoj malpli antaŭas ol la internacia Pakto

rilanta al la ekonomikaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj kaj adoptita dum 1966, ratifita de ĉiuj ŝtatoj, kiuj estas petitaj adopti la projekton de europa Konstitucio ; kaj validita dum 1976 ; ankaŭ kompare kun kelkaj konstituciaj kaj leĝaj dispozicioj adoptitaj en pluraj landoj de la Unio. Aliparte, en la antaŭparolo de tiu Ĉarto, aperas neniun referencon al la Universala Deklacio pri la Homaj Rajtoj, aŭ la internacia Pakto pri la Ekonomikaj, Socialaj kaj Kulturaj Rajtoj.

La rajto de laboro, t.e. la devo, por la publikaj potencoj garantii tiun rajton, aperas en la artikolo 6 de la Pakto kaj en la artikolo 23 de la Universala Deklaracio, sed ankaŭ en la Konstitucioj de la Belgio (art 23,1), de la Hispanio (art.35), de la Finn-lando (art. 18), de la Francio (antaŭparolado), de la Luksemburgo (art. II,4), de la Italio (art 35 ), de la Irlando (art.45,2), de la Nedrelando (art.19), de la Portugalio (art.58). En la proponita Konstitucio, tiu rajto malaperis. Ĝi estas anstataŭita de « *la rajto labori* » (art. II, 15). Kvazaŭ malrespektema ŝerco !

Aliaj rajtoj, barakte akiritaj en kelkaj europaj landoj (Germanio, Belgio, Danio, Hispanio, Finn-lando, Francio, Luksemburgo, Italio, Irlando, Nederlando, Portugalio, Svedio), kiel la rajto por minimuma civitan-enspezo, la rajto por emerita pensio, la rajto por monsubteno al senlaboruloj, la rajto por deca loĝejo ; la ĉies egalecaj eblecoj por aliro al iomaj servadoj kaj la rajto por lerni dum la tuta vivo nenie aperas en tiu Konstitucio kaj la europa Unio estas devigata por nenio pri tiu temo.

Koncerne la rajtoj por sekureco kaj sociala helpo ankaŭ la rajto por la flegadoj, ili jam estis agnoskitaj dum 1948 laŭ la artikolo 25 de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, Same, en la Konstitucio de la Belgio (art 23,2), de la Hispano (art.41 et 43), de la Finn-lando (art. 19), de la Francio (antaŭparolado), de la Luksemburgo (art. II,5), de la Italio (art 38), de la Irlando (art.45,4), de la Nedrelando (art. 20), de la Portugalio (art.63 et 64). En la proponita Konstitucio, tiuj rajtoj aperas en malprecizaj formuloj, kiuj certigas neniun juran garantion . Tiel la Konstitucio « agnoskas kaj respektas » (art. II-34) la rajton je aliro al socialaj sukuroj kaj socialaj servoj en la ŝtatoj, kie ili ekzistas. Same tiel proponita por la san-servoj (art. II-35), ĝi ne devigas la kreadon de tiaj servoj nek malpermesas ilian malkreskiĝon aŭ malaperon, kie ili ekzistas. La teksto referencas klare al reguloj fundiĝintaj la juro de la Unio, tiuj reguloj, kiuj ni scias pli ofte okazigas malfaron de sociala protekto. La formulado « agnoskas kaj respektas » estas trompilo, kaj ĝi devigas nenion por la europaj instancoj.

Oni povintus sekve kaj aldone al la kvar dogmoj de liberalisma modelo, piedestaligitaj kiel (I-4) « *la fundamentaj liberoj de la Unio* » (llibero de lokigo kaj de veturado por la personoj, por la servoj, por la varoj, por la kapitaloj) ekvilibri la povon donita al merkato per pezo de kolektivaj rajtoj. Oni elektis rifuzi tiun ekvilibron.

Oni ja konstatas, la regreson estas grava. Estas neniu *«antaŭen-paŝo », inverse estas multaj retroaj paŝoj*. Tio ne malhelpas la francaj sociala-demokatoj Delanoë kaj Strauss-Kahn aserti, ke ĝi estas la «*deklaracio de rajtoj plej kompleta kaj moderna ĝis hodiaŭ kaj kiu fortikigas vastigitajn socialajn rajtojn.* » [8]

Ankoraŭ pli malbone, la naciaj juraĵoj, kiu laŭ la landoj donas rajtoj malĉeestantaj en la Ĉarto, ne plu estos garantiataj, konsekvence de tiu europa Konstitcio kiu submetas la disdonistan funkcion de la ŝtatomembroj al la liberalistaj principoj por interŝanĝo kaj monero-mastrumado de la Unio. La fundamentaj rajtoj estas neglektataj pro favoro al nepriĝo, kiu estas trakti la ekonomian politikon kiel « respondo pri *komuna intereso»* (art. III-71 ) kadre de « *respekto de principo por merkata ekonomio, malfermita, kie la konkurenco estas libera* » (art. III-70). Grupo da teknokratoj, kiuj neniam dependas de la civitanoj zorgas pri la ĝusta realigado de tiuj dispozicioj, laŭ indiko de artikolo III-76, 2, kiu precizigas« *la Komisiono voktas la evoluon de la budĝeto kaj de publika ŝuldo por ek-kovri gravojn erarojn*

Oni ne dubu, ke pro la ideologio, kiun ĝi gardas, La Komisiono taksos ĉiun socialan politikon kiel « *nediskutebla eraro***».**
Plie kaj barile, ĉiu propono pri sociala asekuro, pri sociala protekto, pri protekto de laboristoj kaze de rompo de labor-kontrakto, pri kolektiva defendo de laboristoj kaj dungistoj, kaj pri kondiĉo de dungo pro la eksterlandanoj en stato de regula restado (III-104,1 et 3) estos submetenditaj al unuanima decido de Konsilio de Ministroj.

Iuj asertas, ke la limigoj rilate la sociala kampo estas kompensitaj far la volismo esprimita en la teksto pri labor-favoro. Estas ankoraŭ blindigaj plorigiloj : la proponita Konstitucio substrekas , ke la politikoj pri labor-kreado de la ŝtatoj devas respekti la grandajn direktojn, kiuj estas enkadrigitaj per la postuloj de merkata ekonomio (III-98).

Plie la apliko-kampo de tiu Ĉarto estis limigita sekve de postuloj de britaj socialaj-demokratoj. La artikoloj II-51 kaj II-52 precizigas, ke tio kio estas en tiu Ĉarto estos aplikebla nur en europa juro kaj ne en naciaj.

Konklude kiam temas pri fundamentaj rajtoj, eĉ plej modestaj la Konstitucio trudas nenion.

En la enkonduko de la Ĉarto, paragrafo aldonita post verkado de la teksto proklamita en estro-renkontiĝo de Nice, por ligi ĝian aplik-kampon laŭ limiga interpretado formulita dum ĝia verkado. Rezulto de tio estas ekzemple : ke tiu Ĉarto ne povos apogi en lando de Thatcher kaj de Blair por ĉesigi la laborigon de infanoj. Europo,.. por kion fari ? Konsentu kun la eks-prezidanto de franca konstitucia Konsilio, Robert Badinter, ke *«la Sociala Europo ne progresas, krom en la deklaracioj* [9] ».

Kiel rimarkigas tre ĝuste la profesoro pri publika juro Serge Regourd, la projekto de Konstitucio « faligas la ekziston de ŝulditaj rajtoj " *kiuj karaterizas niajn naciajn sistemojn : la liberoj ne plu estas traktataj kiel garantioj, donaĵoj je ŝuldo de la publika komunumo, penumendaj je la nomo de la socio por profito de la civitanoj. Tiuj liberoj estas nur ebloj por individuoj, kiuj eventuale trovos mem rimedojn por efektivigi ilin sed en plena respekto al liberalisma kunteksto, tio estas stato antaŭ disvastiĝoj de la « protektanta ŝtato ». Ja do temas pri regreso* [10] ».

7

# ĈU LA KONSTITUCIO PERMESAS STARIGON DE PUBLIKAJ SERVOJ

Kelkaj taksas kiel plibonigego la fakton, ke la konstitucio finfine agnoskus la nocion « publika servo » renomita – pro-per europa ĵargono – Servo por Ĝenerala Ekonomia Intereso (SĜEI)° Estas tute mistifiko.

## Kio estas publika servo ?

Fundamentaj rajtoj estas proklamitaj. Ili sekurigas egalecon. Ili malhelpas socian eksigon. Kondiĉe ke oni povu plenumi ilin. Proklami tiujn rajtojn signifas, ke publikaj potencoj nepre ebligu ĝiajn plenumojn. La rajtoj pri sano, kulturo, laboro, loĝejo, minimumo de vivrimedoj, akva-elektra-veturorimeda, komunikorimeda atingeblo, nepre necesas, ke publika potenco garantiu la servon.

Proklami rajton efektivigas elekton de socio : ĉi-tiu sintrudas ĝeneralan devigon : dediĉi necesajn rimedojn por egala rajto al ĉiuj pri fakaj servoj. Sekve servo nocio de servo preterĉefas nociojn de profito kaj konkurenco. La kolektivumo, zorgante ĝeneralan intereson, respondecas ŝuldojn pri al ĉiujdonita servo. Tiel fundamente naskiĝis publika servo, samspece, en pluraj europaj landoj dum la 20a jarcento. Laŭtempe ĝi iĝis nepra ilo por socia kunligeco.

La europa komisiono neniam agnoskis nocion de publika servo. Tiun diraĵon forpelis la europopotenca dirmaniero.

En la proponita konstitucio, la nocio :« *publika servo* » estas anstataŭigita (II-36, III-6, III-55, II-56) per multe pli sencdubiga :« *servoj por ĝenerala ekonomia intereso* »(SĜEI). De nove la teksto uzas terminaron, kiu signifas neniun kontrakton je la nomo de la Europo, ĉi tiu : « agnoskas kaj respektas la atingeblon de servoj pri ĝenerala ekonomika intereso same kiel antaŭvidis ĝin la naciaj leĝaroj... » (II-36).

Sed kio estas SĜEI? Neniu difino en la proponita konstitucio. Neniu faka ĉapitro pritemas.Necesas konsulti dokumentojn de la europa komisiono por trovi difinon. Fakte la komisiono estigi konfuzon kreante la esprimon : « Servo de Ĝenerala Intereso » (SĜI). Multaj opiniis ke tiu nocio estas multe pli proksima al la publika servo, ĉar la Ekonomia referenco mankas. Ili eraris. La komisiono publikigis je septembro 2000 « komunikaĵon pri SĜI », je majo 2003 « verdan libron pri SĜI » kaj konkluante viciĝantajn debatojn, ĝi publikigis komence de 2004 « blankan libron » pri sama temo. En tiuj tri dokumentoj, la komisiono indikas, ke la nocio de SĜI koncernas komercajn kaj nekomercajn servojn, dum SĜEI koncernas ekonomikajn servojn, pri kiuj, ŝtatoj trudas rolojn de publikaj servoj : transportado, poŝto, energio, komunikado, ekzemple

Plie la nocio de SĜI ne troviĝas en iu ajn traktato, ankaŭ ne estas skribita en la proponita konstitucio. Publikigante pri tiu nocio, post la konkludlaboroj de la Konvencio t;e; « blankan libron », la Komisiono montras, unu plian fojon, ke ĝi intencas agi sen traktato. De tiam, kial necesas konstitucio, kiu ne protektas kontraŭ potenco-trouzoj far institucio, kiu ne respondecas fronte al civitanoj ?

De tiuj Komisionaj dokumentoj rezultas, ke interagado de publikaj servoj kuntaŭgas al SĜEI nur se oni povas pruvi, ke la merkato ne provizas la atenditan servon kaj kondiĉe ke la SĜEI tiam permesata respektas la konkurencajn regulojn.

Ĝis kiommezure merkataj leĝoj povas akordiĝi kun servo-devigeco ? Pri tiu ĉefega demando, la proponita Konstitucio respondas:"la entreprenoj, kiuj administras la servojn pri ĝenerala kaj ekonomia intereso aŭ kiuj aspektas kun fiska monopolo, devas respekti la Konstitucian dispoziciojn, nome la konkurencajn regulojn, kondiĉe ke la apliko de tiuj reguloj ne malsukcesigas jure kaj fakte la plenumon de la faka ofico, kies ili respondecas.(III-55). Post prezentado de listo pri publikaj helpoj, kiuj kuntaŭgas la Konstitucion (III-56), kiu citas nek publikajn servojn nek servojn pri ĝenerala kaj ekonomika intereso (SĜEI), la Konstitucio sciigas, ke helpoj pri transporto kuntaŭgas la dispoziciojn (III-136).De nove, tiu Konstitucio montras oponajn dispoziciojn, kiuj permesas ajn interpretojn al juĝanto.

La Konstitucio (III-6) konfidas al Europa leĝo la zorgon difini la pricipojn ankaŭ la ekonomiajn kaj financajn kriteriojn pri funkciado de tiuj « servoj pri ĝenerala ekonomia intereso ». Male tio, kion asertis franca social-demokratulo, *Olivier Duhamel,* Konvencia membro, en publikita libro[12] fine de ĝia laboro, tio neniel montras garantion, sciante ke la komenca redaktisto pri tiu leĝo estos la Europa Komisiono, kies la klopodadon pri malkonstruo de publikaj servoj oni konas, same en Europa spaco, kiel sine de OMK. Krome, konfidi al la Europa Komisiono zorgadon pri respekto de tiu leĝo, konstituas plian minacon por la publikaj servoj, sciante la konsideradojn esprimitajn pri SĜI.

Ni ĵus vidis, male tio, kion subkomprenigis la francaj social-demokratuloj Delanoë, Duhamel kaj Strauss-khan ankaŭ francaj verduloj, ke la « Servo pri Ĝenerala Ekonomia intereso » ne estas sama afero kiel publika servo. La proponita Konstitucio nek agnoskas nek protektas ĝin. De ties malkonstruo ĝi starigas la mekanismojn.

.

**8**

# ĈU LA KONSTITUCIO CERTIGAS KAPABLON STARIGI FAR EUROPO ESTERLANDAN KAJ DEFENDAN POLITIKON?

LA tragedio de palestina popolo, la milito en Kosovo, la invado de Irako, eĉ etega malkonsento inter Maroko kaj Hispanio pri tertorieco de eta insulo, monstris ĝis primokindo, la nekapablon de Europo interveni kiel decida aganto en eksterlandan politikon.

La eŭropa Unio aspektas pasiva por defendo de valoroj, kiuj ĝi spite proklamas fundamenta. Ne temas pri celo starigi imperian trudon, sed celo iĝi gardanto de internacia juro. Jen tio, kio sopirigas aŭtonomian ag-povon de Europo..

Spite de tio, La proponita Konstitucio anoncas inversan evoluon. Ĝi fortikigas submetiĝon de la europaj landoj kaj de eŭropa Unio al USONA politiko, kiu regas politike kaj militare super NATO.

La proponita Konstitucio precizigas, ke la politikoj pri sekureco kaj komuna defendo de eŭropa Unio « *respektas la devigojn de la Nord-atlantika trakta, kiuj por iuj ŝtatoj, kiuj konsideras NATON kiel la kadro de komuna defendo.* » La teksto precizigas, ke tiu komuna politiko pri sekureco kaj defendo estu « kongrua kun la komuna politiko pri sekureco kaj defendo difinita kadre de NATO » (I-40,2). Ĝi aldonas, ke « *la kontraktoj kaj la kunagado restos akorditaj kun la Kontraktoj subskibitaj sine de NATO, kiu restas por la ŝtatoj, kiuj aliĝis NATOn la bazon de ilia defendo kaj la instancan ilon de ĝia efektivigo* » (I-40,7).

Pri militaraj kapabloj, la Konstitucio ne priskribas la militaraj kapabloj de eŭropa Unio, sed de tiuj de ĉiu ŝtato : « *la ŝtatoj promesas plibonigi progresive siajn militarajn kapablojn* » (I-40,3). Tio, lasas larĝe malfermita la pordon, por influoj de milito-industrioj pov-premoj super la ŝtato-membroj, kie tiuj industrioj ekzistas, sed ankaŭ same favoras naciajn aĉetaĵojn sub premo de usona milito-industrio super la ŝtatoj, ĉar neniu europa limigo pri tiaj kontraktoj ekzistas en la proponita Konstitucio. La avert-ekzemplo de la poliaj aĉetoj ( kiuj ne estas solaj) al Usono estis ignorita.

La proponita Konstitucio fortikigas la projekton de komuna atlantika areo . Kiel skribas Jean-Claude Casanova, partizano de la proponita teksto, « *tiu Konstitucio agnoskas la triumfon de la brita politiko, ĉar ĝi atingas situacion por Europo (…) , kie Unita Reĝejo iĝos samtempe la poltika pivoto, dank al tio, ke ĝi difinos regulojn kaj limojn, kaj ĉarniro kun Usono, kies ĝi estas parenco kaj najbaro. En Eurameriko, kiu ekvidiĝas, Britujo tenas centran rolon* » .

9

# ĈU LA KONSTITUCIO PROTEKTOS LA EUROPEANOJN KONTRAŬ LA NOV-LIBERALISMA GLOBIGADO ?

LA proponita Konstitucio enviciĝas en la mondan nov-liberalisman fluon nomita nov-liberalisma tutmondiĝo aŭ globigado. Laŭdifine nov-liberalismo celas redukti la ag-povon de la ŝtatoj al sekurecaj funkcioj. Konforme kun tiu politika doktrino, la Konstitucio (I-5,1) « *respektas la esencaj funkcioj de ŝtato, aparte tiujn, kiuj celas sekurigon de teritorio, pluzorgi la publikan ordon kaj la nacian sekurecon* ». Neniu spuro de ago-povo, regulig-povo, disdon-povo en tiu nov-liberalisma kredaro.

Oni do ne miros, ke la proponita Konstitucio estos aparte rifuzema ek de temas pri europa integriĝo en la fiskaj kaj socialaj kampoj. La dispozicioj, kiuj ebligus harmonigi rektan fiskon aŭ la impostojn de la societoj, aŭ lukti kontraŭ fiskajn fraŭdojn, fiskajn kaŝ-el-lasojn, aŭ malhelpi fiskan dumpingon, ne povos esti adoptitaj krom, se ĉiuj ŝtatoj konsentas. Same tial la decidoj por favori la integriĝon de socialaj politikoj kaj por malhelpi la socialan dumpingon postulos unuaniman konsenton (IM-62 kaj 104). Inverse, la dispozicioj celantaj efektivigi la kvar « fundamentajn liberojn laŭ europa Unio» tiujn liberojn pri lokigo, pri moviĝo povos esti starigitaj per majoritato. La proponita Konstitucio sekvas precize la direkton de la fundaj tekstoj por nov-liberalisma globigo finverkita sine de la OKED (Organizo por Kooperado ekonomia kaj disvolviĝo), de IMF (Internacia Mona Fonduso), de la Monda Banko kaj de OMK (Organizo por Monda Komerco).

Daniel Cohn-Bendit kaj Alain Lipietz, europaj deputito (Verdula partio), ariĝante kun la sociala-demokrata Pascal Lamy, proklamas fervore « *lLa europa Unio estas unua riparo fronte al malsukceso de OMK*[15]» Ili klarigas, ke la ebloj ne estas inter la proponita Konstitucio kaj iu ideala teksto, sed inter tiu Konstitucio kaj la validaj tekstoj tiaj, kiaj arigitaj en traktato de Nice.

Ja kvankam, la ĉapitro traktanta pri komuna komerca politiko (III-216 kaj 217) konfirmas la direktojn de la antaŭaj traktatoj. Ĝi ne plibonigas ilin eĉ male. Male al tio, kio asertas la liberalistaj maldekstruloj, la proponita Konstitucio, kondukas la europajn polpolojn al stato de plena submetiĝo al la voloj de la Organizo por Monda Komerco (OMK) kaj al sociaj preferoj, kiujn ili kunportas.

Plimalbone : la artikolo I-11 de la proponita Konstitucio precizigas, ke « *Kiam la Konstitucio donas eksklusivan kompetentecon en aparta kampo, tiam nur Unio povos leĝfari kaj adopti jure devigantanj aktojn.* » Kaj la artikolo I-12 ordigas la komercan politikon en la kampo de eksklusivaj kompetentoj. La naciaj parlamentoj estas sekve senigitaj je eĉ plej malgranda influo super internaciaj komercaj kontraktoj, kiuj estas ja reg-povaj super la fluo de niaj vivoj.

La proponita Konstitucio ja submetas la europajn popolojn al eŭropa Unio, kiu sekvas plene la celojn por nov-liberalisma globigado. Ĝi favoras la superecon de komercaj, ekonomiaj, financaj atingindaĵoj super la aliaj aspektoj de socia vivo, plie kaj samtempe ĝi forprenas la povojn, kiuj permesus al la Unio agi en sektoroj, kiuj tiel ege gravaj estas la regado de imposto sur la kapitalo-movoj (III-45).

Fakte kun tiu Konstitucio, (III-217), ĉiuj kampoj mastrumitaj far OMK kaj tiuj, kiuj estos aldonitaj, estos deciditaj per kvalifika majoriteco sine de europaj instancoj, ekcepte al socialaj, sanaj kaj edukaj servoj. La juro pri posedo de intelektaĵoj kaj la rekta eksterlanda investo estos traktotaj unuanime, kiam tiaj decidoj enestas en europaj reguloj (III-217,4). Same unuanimeco estas postulata por kulturo kaj televidaj servoj, sed subkondiĉe ke estos pruvita minacon kontraŭ diverseco. Se mankas tiun pruvon, la decido fariĝos je majoritato. Nenie estas indikita, kiu devos pruvi, tian minacon. Certas ke, la lando, kiu provos tion fari, estos akuzita kiel atakanto de komerca kontrakto jam traktita kaj aprobita de la unika negocianto de la europa Komisiono.

Ekster tiuj kvin esceptoj, unu sola ŝtato ne plu povos kontraŭstari decidon, se ĝi ricevas majoritaton. Utilas substreki, ka la projekto de Konstitucio rezultinta de la Konvencio, kaj vigle subtenita de tiuj Lipietz kaj Strauss-Kahn, forlasis, je peto de la Komisiono, la trudon de unuanimeco pri decidoj por socialaj, sanaj, edukadaj kampoj, tiu trudo estis en la traktato de Nice. Pro postulado de Finlando kaj de la Svedio tiu trudo estis denove enkondukita en la proponita konstitucio far la Inter-registara Komisiono (IRK).

La proceduro restas senŝanĝa. La Komitato 133 plurestas. Ĝi estos sendube renomita per ĝia nova numero (provizore 217). En la sekreto de pritraktoj, inspiritaj per tekstoj ne konsulteblaj far iu ajn deputito europa aŭ nacia, altrangaj oficistoj de la Komisiono kaj de ŝtato-membroj, decidos mem pri fundamentaj sociaj determinoj. Precizendas, ke tiuj oficistoj havas neniun respondecon antaŭ la civitanoj.

La europa Komisiono, kies povoj estas draste fortikigitaj, estos tiel pli efike favor-pova rilate la petoj de la aferaj medioj. Ekzemple favori la disvendojn de gen-modifitaj vivaĵoj, aŭ antaŭentpuŝante la interkonsentojn kun OMK pri la sen-barilo-stato por la investoj , aŭ la fortikigo de la posedrajtoj pri intelektaĵo riltantaj kun vivaĵo, kaj fine privatigo de servoj.

La artikolo III-216, traktranta la komercan politikon, estas trafa ekzemplo, por montri ideologian inspiron de la projekto de Konstitucio, ĉar ĝi klare devigas la Union okazigi « *la formeton de limigo por rektaj eksterlandaj investoj ».* Kvankam samtempe, la Monda Banko agnoskas, post studo pri evoluo de tiuj investoj en tridek unu landoj kaj dum la lastaj dudek jaroj, ke tiu mallimigo ne kreskigis tiujn investojn. Sed ja la celo de tiu mal-limigo ne estas kresko. La verkistoj de la proponita Konstitucio nur kontentis per tio peton de la afer-medioj, kiuj deziras esti liberigitaj je priatento al mediaj, fiskaj kaj socialaj leĝoj de la landoj, kie ili investas. Tiuj leĝaroj ili konsideras kiel malhelpojn por iliaj agadoj. Konsekvence allasi tiun dispozicion, kondukas al verda trafiklumo sur retrovojo al « Multflanka Konsento pri investoj » (MKI) forpuŝita en 1998.

La kunligaj efikoj de la artikoloj I-12 ( ekskluzivaj kompetentecoj de la Unio en preskaŭ ĉiuj temoj ligitaj al internaca komerco), III-6 (servoj por ĝenerala ekonomia intereso), III-68 (posed-rajto de intelektaĵoj), III-216 kaj III-217 (komuna komerca politiko) disponigas plene kaj daŭre la rimedoj por trudi la decidojn de OMK al la europaj popoloj.

Tiu projekto de Konstitucio ne protektas kontraŭ la globigadon, inverse ĝi submetigas nin al globigado.

10

# KIEL ONI POVOS MODIFI LA KONSTITUCION ESTONTE ?

LA partizanoj de la proponita Konstitucio klopodas por prezenti ĝin kiel dokumento konsentinda kaj fleksebla montrante unue tiujn ŝanĝojn, kiujn ili asertas povi fari en ĝi. Iuj ja anoncas iun socialan europon, kiujn ili ne realigis, kiam ili disponis la necesajn politikajn majoritatojn ; aliaj promesas gravajn plibonigojn en la tria parto de la teksto, eĉ mem je la eldono de la teksto.

Kion valoras tiaj promesoj allogilaj? Ni memoru pri la naivul-trompilo lanĉita far Jacques Delors : « konsentu pri *Maastricht kaj ni faros Europon tuj poste sociala.* » Oni atendas ankoraŭ.

Fakte ili mensogas kaj trompas nin. Ĉar ili scias, ke tio ne estas ebla. La europa proponita Konstitucio prezentas escepta karaktero en la tuta mondo: ĝia modifo devigas unuanimecon. Jen kion precizigas la artikolo IV-7,3 : « *la ŝanĝaĵoj iĝos validaj post ratifo far ĉiu ŝtatomembro » kaj post proceduro tre peza, kiu konsistas el kunvenado de Konvencio sekvita de kunsidoj de interregistara konferenco. Unu nura ŝtato povos bloki iun ajn modifon*. Estos kvazaŭ ŝanĝi la Usonan Konstitucion estos pli facila ol ŝanĝi ltiun de la eŭropa Unio.

Iuj, kiel la sociala-demokrata deputito Jack Lang16, asertas, ke « *la unuanimeco estas ĉiukaze en internacia juro ».* Nu do ni ĉesu paroli pri Konstitucio, ni ĉesu doni al traktato statuton kaj povon je konstitucia naturo, formetu la artikolon I-5 bis ! Sed ĉiu scias, ke preterfluis la tempo de ŝanĝebleco de la teksto. La partizanoj de la proponita konstitucio defendas ke la tekniko de « ponteta klaŭzo » ebligos facile modifi la Konstitucion. La urbestro de Parizo Delanoë kaj la franca deputito sociala-demokrata Strauss-Kahn troige asertas[17] ke estas « ŝlosila novaĵo, kiu donas al tiu traktato eblon por ŝanĝo pli facila ol por la antaŭaj tekstoj». Temas fakte pri proceduro simpligita por revizi la Konstitucion enskribita en artikoloj IV-7 bis kaj IV-7 ter. En la fakoj, kie la Konstitucio postulas ke la decidoj devas esti farataj far la unuanimeco de la Konsilio de la ministroj, la europa Konsilio ( la estro de ŝtatoj kaj registaroj) povos decidi sen submeto laŭ la normala proceduro por revizio kaj tiel fari modifojn. Fie la vantantoj de tiu krom-proceduro silentas pri tio, ke la ŝtat- kaj registrar- estroj devos esti unuanimaj kaj, ke poste la modifoj devos esti ratifitaj far ĉiu ŝtato-membro.

Vetante sur mal-legebleco de la tekstoj kaj komplikeco de la procezo, tiuj samaj volas kredigi, ke « tiu teksto estas de-ir-punkto, kaj neniel fin-punkto» kaj provas komprenigi, ke vojego estas tiel malfermota por la apartaj kooperadoj.. Temas pri proceduro enkondukita en traktaton de AmterdamoI kaj precizigita en tiu de Nice. Ĝi estas konfirmita en la proponita Konstitucio. La ŝtatoj, kiuj deziras ( la minimuma nombro ne precizitas kontraŭe ol farita en traktato de Nice, kiu fiksis ok),

Povas decidi pli fortan integriĝon, en politikaj kampoj laŭ ilia komuna elekto, laŭ modelo de Schengen spaco aŭ de la Euro zono.

Sed tiu libero estas limigita per 4 gravaj kondiĉoj, kiuj malhelpas prezenti tiun proceduron kiel rimedo por kompensi kaj konsentigi la mankojn de la proponita Konstitucion.

1. Tiuj apartaj kooperadoj estos nur proponeblaj en la kampoj listigitaj far la Konstitucio, kiuj ne estas en la kampo de eksklusivaj kompetentecoj de la Unio (III-325). La eksklusivaj kompetentecoj de la Unio konsistas el fakoj, kie nur la Unio povas leĝ-fari (I-11,1 ). Tio baras ĉiu ajn apartan kooperadon pri dogan-unuiĝo, pri reguloj de konkurenco en interna merkato, la mona politiko en Eurozono, la protekto de la mara riĉfonto kaj la negoca politiko. Plie, la Unio posedas eksklusivan kompetentecon « por traktadi internacian kontrakton, ĉiufoje kiam tia kontrakto estas aludita en jura akto de la Unio aŭ kiam tiun traktadon necesas por ebligi la efektiviĝon de interna kompetenteco de la Unio, aŭ kaze de influo sur komunaj reguloj aŭ influo de ties apliko-ampleksoj» (I-12,2).

2. la artikolo III-322 precizigas, ke tiuj apartaj kooperadoj « ne povas influpremi la internan merkaton économique, nek ekonomian, socialan, teritorian kongruon. Ili ne povas starigi nek malhelpon, nek diskriminacion por la interŝanĝoj , nek estigi dispreferon pri konkurenco inter la ŝtato-membroj de Unio ». Se, ekzemple, kelkaj membroj, konsiderante, ke akvo apartenas al komuna posedaĵo de homaro kaj ke sekve volas trakti kiel universala la rajton por ĉiuj ricevi trinkeblan akvon, kaj protiu deziras leĝe devigi la publikan povon efektivigi tiun rajton, ne dubeblas, ke tiu volo estos tuj taksata de distordon de konkurenco. Pro tio tia aparta kooperado ĉiam malpermesatos.

3. Estas la europa Komisiono kiu aprezas la peton de la ŝtatoj pri oraganizado de aparta kooperado en iu ajn kampo (IM-325,1). Memorante pri la viglaj preferoj pri nov-liberalismaj dogmoj, oni prudente timas, ke ĉiu initato favore al publikaj povoj estos rekte forpuŝitaj.

4. la artikolo III-325,2 precizigas: « la permeso starigi apartan kooperadon venos de unuanima decido de la Konsilio. » Do nepros, ke la ŝtatoj, kiuj ne volos aliri integriĝon en iu kampo permesu al la aliaj, antaŭeniri .Oni penas imagi konservatismajn registarojn konsentonte liberan esprimon de progresiva registaroj.

La proceduro de aparta kooperado prezentas neniun seriozan esperon modifi la tekston laŭ la klasikaj proceduroj de revizio de iu Konstitucio.

La verduloj, vanteme volemaj al novaj politikaj pratikoj, figenie miksumaĉis la kartojn kaj kreskigis konfuzon kredigante, ke estos ebla konsenti pri iu parto de la konstitucia traktato kaj rifuzi alian parton. [18]

Tiuj, kiuj serioze legas la tekston, neniu dubo, la proponita konstitucio estas tutaĵo akceptenda aŭ rifuzenda bloke sen espero modifi ĝin en antaŭvidebla prokrasto. Tiu Konstitucio fermas estontecon.. Nia kaj tiu de niaj infanoj. Ĝi liveras nin kun ligitaj manoj kaj piedoj al potenco de financoj kaj negocoj. Iu momenta kunligo de registaroj konservatismaj, liberalismaj el dekstrumo kaj maldekstrumo trudas al la europaj popoloj kaj idoj, modelon de socio kiu enkorpigas la venkon de merkantisma ideologio.

En la artikolo 28 de la Deklaracio de rajtoj de homo kaj de la civitano de la I-a jaro de la franca respubliko (1793), la fondintoj de la Respubliko saĝe kaj modeste skribis dispozicion kiu kruele mankas hodiaŭ : << Popolo ĉiam havas rajton revizii kaj ŝanĝi sian Konstitucion. Nuna generacio ne rajtas submeti al siaj leĝoj venontajn generaciojn. »

II

# KOMPARE KUN LA VALIDAJ TRAKTATOJ PRI KIO LA KONSTITUCIO KUNPORTUS PROGRESAJN PUNKTOJN ?

Por ĉiuj, kiuj taksas konstruon de Europo kiel celo memstara (« Ĉio kio helpas antaŭeniron de Europo; mi favoras [19]», la proponita teksto entenas « nedubelaj progresoj [20]». Ĝi arigas en unu dokumento la kvin nune validajn traktatojn. La statuto de tiu traktato valoras konstitucie kaj surŝtupiĝas je plej alta nivelo la hierarkio de normoj en Europo. :La ĉarto de fundamentaj rajtoj proklamita sen jura statuto okaze de ĉefkunveno de Nice entenitas; la prezido de la Unio etas certigita je pli impona pozicio kaj pli fortika stabileco, la eŭropa Unio ricevas juran personecon; la europa Komisiono ricevas rimedojn pluigi sian agadon.

Sed Kial, kiel trafe demandas tri socialistaj deputitoj, «*sanktigi tiun regulon de unuanimeco, kiu estas kaj demokratie fuŝa kaj malpovo-fonto* [21] *»? Ĉu necesis kun tiom da forto tia ideologia karaktero? La fina versio de la traktatoj post adopto de la novaj dispozicioj prezentas kompletan staton de la inter-registaraj interkonsentoj. La supereco de la europa juro jam estas en la validaj tekstoj kaj doni juran valoron al la Ĉarto de fundamentaj rajtoj kaj doni al la eŭropa Unio juran personecon, oni povintus atingi per simpla traktato, same kiel por necesaj aldonaĵoj por funkciado de larĝigita Unio . Krome tiuj, kiuj nur volas paroli pri la progresoj rilate la nune validaj tekstoj, ili celas kredigi, ke la cetero estos facile plibonigebla kaj ke la proponitaĵo reprezentas nur etapon. Oni ĵus vidis, kiom ege erariga estas tiu vid-punkto (demando 10);*

Kiam M. Giscard d'Estaing asertas, ke tiu Konstitucio staros « *dum kvindek jaroj* », oni fidu lin ! Kaj tri socialistaj altranguloj heroldantaj hodiaŭ por subteno de la proponita teksto, iam deklaris « *malkvieton pro la etega eblo antauvidebla en la Konstitucio por permesi plibonigon de ĝia enteno* ». Se nenio estos ŝanĝebla en ideologia kaj politika direktoj de tiu Konstitucio, se tiuj direktoj trudiĝas en la nacia juro de la ŝtato-membroj, tiam sekve la naciaj balotoj perdas ĉian ajn sencon. La civitanoj estas malposedigitaj de siaj politikaj rajtoj eĉ la plej fundamentaj. Tio spite de rimarko de Jean-Paul Fitoussi, «*la aparteco de demokratio estas ebligi, ke politika decido estu retroirebla* [23]».

12

# KIAJ ESTOS LA KONSEKVENCOJ DE RIFUZO DE LA PROPONITA kONSTITUCIO ?

La artikolo IV-8 de la Konstitucio starigas :

« *1. La jena traktato estos ratifita far la altrangaj reprezentantoj de ĉiu partoprenanto, laŭ la propraj konstituciaj reguloj. La ratifa pruv-dokumentoj estos deponitaj enmane de la itala Respubliko. 2. La jena tratakto ekaplikiĝos la unua de novembro 2006, kondiĉe ke ĉiuj ratif-dokumentoj estos deponitaj, se ne estos ek de unua tago de la dua monato sekvanta la deponon de la ratifilo far la malfruanta subsribinta ŝtato.* »

Necesas do ke ĉiuj 25 ŝtatoj ratifu la tekston ,por ke ĝi aplikeblu. La rifuzo de nur unu ŝtato sekvigos forĵeton de la teksto. Sed la 25 registaroj adoptis aldonitan deklaracion, kiu diras, « *se je prokrasto de du jaroj post la subskribon de la traktato proponanta la Konstitucion, la kvar kvinonoj el la ŝtatoj estos ratifintaj tiun tekston kaj unu kaj pluraj ŝtatoj membroj frontis malfacilaĵojn por atingi ratifon, la europa Konsilio pritraktos la aferon*» (CIG 86/04, ADD2, p.72).

Tio signifas, ke se fine de oktobro 2006, la Konstitucio estos ratifita far 20 ŝtatoj, la sorton de tiu teksto determinos la tipon de la ŝtatoj , kiuj estos rifuzintaj ĝin. Jam dank al maniero uzita por ignori la rifuzon ( Maastricht) de la dana polopo kaj la rifuzon (traktato de Nice) de la irlanda montras klare la respekto-neglekton, kiu inspiras konduton, kiam popoloj baras per referenduma rezulto, la projektojn subtenatajn de potencula sfero. La voĉdono tiel perdas sian ne-preterpaseblan decido-povon de la popoloj, kaj jen la kontraŭstarantoj instigitaj revoĉdoni ĝis, kiam la rezulto konvenos al posedantoj kaj ties politikaj perantoj.

Tio kio trude eblis kun malgrandaj landoj, sendube estus malebla se temos pri Germanio, Hispanio, Francio, Britio, Italio, simple sekve de tio, ke tiuj landoj arigas atutojn de surfaco, loĝantaro kaj ekonomia potenco. Rifuzo en Polio pezus ankaŭ grave, kiel simbolo de re-unuiĝo de Eŭropo.

Iu registaro, kiu adoptis la projekton de Konstitucio, normale estas subtenata de plimulto de la parlamento. Sekve, ĉiukaze kiam la ratifo proceduro venos per parlamenta vojo, tiam ne dubindas ke la proponita europa Konstitucio estos ratifita de tiu ŝtato.

La eblo de rifuzo venos nur de la eblo por popolo sin esprimi dank al referendumo, kiam nacia konstitucio permesas tion. Danio, Irlandio, Luksemburgio kaj Portugalio decidis organizi referendumon. Sed oni ĵus konstatis, ke se la popoloj de tiuj landoj forpuŝos la Konstitucion,

La europa Konsilio trovos solvon dank al deklaracio aldonita al la Konstitucio. Inverse, la referendumoj anoncitaj en Hispanio, en Francio kaj en Britio draste imponos.

Brita rifuzo ne sufiĉus rediskutigi le entenon de la Konstitucio. La malŝaton de la loĝantoj de Unia Reĝejo (kiu ne estas en Euro zono nek en Schengen spaco) pri la europa integriĝo estus anoncita kiel ĉefa kialo de rifuzo. Tiam estos la statuto de Britio, kiu estos diskutenda. Male rifuzo far Hispanio aŭ Francio, ĉefe se ne izolita kaj se li ne estos klarigebla nur per naciismaj aŭ suverenistaj kialoj aŭ euroskeptismo, malfermus danĝeran krizon.

Tio ne estus la katastrofon jam svingitan far la partizanoj de la Konstitucio, kiuj uzos tiun tim-imponon. Inverse rilate kion ili diras, la kaziĝo ne estas ĉu Konstitucio ĉu kaoso. Se la Konstitucio estos rifuzita, la ĝisnunaj tekstoj plu aplikiĝos kaj tiel certigas pluecon. Ankaŭ gravas substreki, ke tio okazigas neniun domaĝon. Fakte pri la labor-provizado (III-97 ĝis 102), la sociala politiko (III-103 ĝis 115), la ekonomika, sociala kaj teritoria kuniro (III-116 ĝis 120), la agrikulturo kaj la fiŝkajtado (III-121 ĝis 128), la medioprotekto (III-129 ĝis 131), la defendo de konsumantoj (III-132), la transportoj (III-133 ĝis 143), la transeŭropaj retoj (III-144 kaj 145), la serĉado, la teknologia kaj kosma disvolviĝo (III-146 ĝis 156), la publika sano (III-179), la industrio (III-180), la kuturo (III-181), la turismo (III-181 bis), la klerigo, la junularo, la sporto kaj la profesia instruo (III-182 kaj 183), neniu modifo, do neniu plibonigo estas aldonita relative kun la nunaj aplikitaj tekstoj. Rifuzi la proponitan Konstitucion neniel malhelpos la planojn nune sekvataj de la eŭropa Unio.

Iuj diras : << Se ne la Konstitucio, tiam reen al tiu abomeninda Nica traktato », tio signifas la nune aplikata traktato. Ili forgesas, ke ili estas mem farintoj de tiu traktato. Ili forgesas, ke post tiu ĉefkunveno de Nico, la franca prezidanteco (Chirac-Jospin) tiam gratulegis pro la atingitaj rezultoj. La tiama franca ministrino pri justico, la sociala-demokrata Elisabeth Guigou, ne ŝparis akregajn vortojn kontraŭ la kritikantoj de la Nicaj atingoj, kaj taksante kun malestimo tiujn, kiuj en tiu okazo plendemis pri ne klareco de la tekstoj [24]. Ja demandindas, kial tiuj, kiuj tiel malbona nune taksas la traktaton de Nico, postulis tiam antaŭe, ke ĝi estu ratifita ?

Se iam tiu Konstitucio rifuzita, la estonteco de nove malfermiĝos. Ĉiuj fakuloj de la eŭropa integriĝo konsentas : tiu procezo antaŭeniras nur krizo post krizo. Hodiau krizo nepras por ekvilibri la tuton. Rifuzi la proponitan Konstitucion kreos tiun krizon. Tio trudos al elektitoj kaj registaroj repreni la laboron. La ŝoko okazigita de tia rifuzo trudos la respekton de normalaj procezoj demokrataj por elfaro de aŭtenta Konstitucio agnoskante semgrave la fundoj de librereco kaj solidareco.

# GRAVEGA REGRESO KIU STIRAS KONSERVATISMAN RESTAŬRON

La proponita Konstitucio rivelas plenlume la karakteron de la politika projekto nomita « eŭropa Unio » : uzi la europan idealon por konkeri de supre tion, kion la politikaj kaj ekonomiaj elitoj devis cedi laŭ longe de ducent jaroj en ĉiu lando.

Post jarcentoj vunditaj de diversaj teruraĵoj, la homaro adoptis komunajn regulojn. Ili ariĝas en la Universala Deklaracio de Rajtoj de homo, en internacia pakto pri socialaj kaj kulturaj rajtoj, pakto pri civilaj kaj politikaj rajtoj, la baza sociala konvencio adoptita sine de internacia organizo pri laboro. Jes ja tiuj reguloj restas ankoraŭ malproksime de plena respektiĝo kaj aplikiĝo. Sed ili restas celon por ĉiuj.

La proponita europa Konstitucio flaken lasas kelkajn el tiuj celoj inter la plej gravaj : tiuj , kies naskit-lito etas en eŭropo mem.

Oni proponas al ni adopti tekston traktadita far la potenculoj kaj nomita Konstitucio. Sed tiu Konstitucio neniel limigas la povon de la potenculoj. Tio sptite la fakto, ke ĝuste en Eŭropo naskiĝis ideon de Konstitucio farita far volo de popolo kaj protektanta popolon kontraŭ la potenculoj.

Oni proponas al ni konsenti pri teksto, kiu permesas al la publikaj povoj doni monon al eklezioj. Tio spite ke ĝuste en eŭropo naskiĝis ideon de laikeco.

Oni proponas al ni konsenti pri teksto, kiu ne estas Konstitucio, sed ideologia manifesto de nov-liberalismo, kies celo estas limigi la rolon de la publikaj poviloj en perilo de sekureco kaj subpremo. Tio spite, ke ĝuste en eŭropo forĝiĝis tipon de ŝtato faranto, regulanto, disdonanto.

Oni proponas al ni,  proklame de demokratio, konsenti pri teksto, kiu ignoras la fundan principon de demokratio : ĉiuj povoj venas el popolo. Tio spite, ke ĝuste en eŭropo tiu principo esti proklamita plejfrue.

Oni proponas al ni konsenti pri teksto, kiu neniel malhelpas la pov-perfortoj de europa Komisiono je servo de financaj potencoj. Tio spite ke ĝuste en eŭropo stariĝis koncepte ke nepras ke « *la povo barilu la povon.* »

Oni proponas al ni konsenti pri teksto, kiu trudas la forlason de socialaj rajtoj kaj de kolektivaj rajtoj agnoskitaj en niaj Konstitucioj, en niaj leĝoj kaj en iuj internaciaj traktatoj. Tio spite, ke ĝuste en eŭropo tiuj rajtoj estis konkeritaj.

Oni proponas al ni konsenti pri teksto, kiu starigas leĝajn devigojn celantaj malaperon de publikaj servoj, kiuj estas iloj ebligantaj efektivigon de kolektivaj rajtoj. Tio spite, ke ĝuste en eŭropo tiu nocio de publika servo ekestis.

Oni proponas al ni konsenti pri teksto, kiu rezignas pri iu ajn europa politiko en internacia kampo, kaj kiu submetas la popolon al negocaj reguloj de globigada nov-liberalismo. Tio spite, ke ĝuste en eŭropo stariĝis la ideo de monda ordo bazita sur juro celanta protekton de la plej malfortaj kaj de kultura diverseco.
Oni proponas konsenti pri teksto, kiu trudiĝos al venontaj generacioj ĉar la proceduro de ŝanĝo fakte igas ĝin ne ŝanĝebla. Tio spite, ke ĝuste en eŭropo naskiĝis ideo, ke generacio devas respekti liberon de venonta generacio.

Tiu teksto malagnoskas la eŭropan heredaĵon kaj mortigas ĉion entenata en ideo de Europo. Ĝi malagnoskas la politikajn kaj socialajn venkojn, post pago de pasintaj gravaj suferoj, eltenataj ĉefe de la plej malpotencaj. Ni ne konsentu ĝin.

Rifuzi ĝin, devigas refundi la laboron. Ja la rifuzo de tiu Konstitucio ne estas fino de Europo. Nek timo pri vakuo, nek pri kaoso : la traktato de Rome de 1957, kompletigita de la sekvintaj plustaras. Ni memoru pri la averto de Mirabeau : *« la homoj pasigas la duonon de iliaj vivoj forĝante siajn katenojn kaj ceteron plendante pri ties portado.* » Konsenti pri tiu Konstitucio, malliberigos nin kaj malliberigos la venontaj generacioj. Estus submetiĝi per katenoj, kiujn niaj antaŭuloj rompis.
Forĵeti la proponitan Konstitucion, signas al la registaroj kaj al la elektitoj, ke ni volas Europon eŭropa, kie solidareco organiziĝas en libereco, kie egaleco regas en diverseco, kie homo vivas harmonie kun naturo, kie la rilatoj kun aliaj popoloj de la mondo defenitive formetas ian ajn nov-koloniismon kaj imperiismon.

Notoj

1 ĵurnalo *Le Monde,* 30-a de oktobro 2003.

2 Dokumento titolita « Ni europaj verduloj » subskribita far listkapoj de verdula partio okaze de eŭropaj balotoj de la 3-a de majo 2004.

3 Dokumento titolita « Ni europaj verduloj » subskribita far listkapoj de verdula partio okaze de eŭropaj balotoj de la 3-a de majo 2004.

4 Komitato de sendependaj ekspertoj, unua raporto pri akuzo de fraŭdo,
De mis-administrado kaj de nepotismo en europa Komisiono, la 15-an de marto 1999, p. 139.

5 Parolado antaŭ la TABD, Brukselo, 23-an de majo 2000.

6 Parolado antaŭ le TABD, Berlino, 29-an de oktobro 1999.

7 ĵurnalo Newsweek International, 1-an de februaro 1999.

8 ĵurnalo Le Monde, 3-an de julio 2004.

9 magazino Le *Nouvel Observateur,* 19-an de junio 2003.

10 ĵurnalo *L'Humanité,* 8-an de decembro 2003.

II COM (2000)580 ; COM(2003)270 ; COM(2004)374.

12 libro *Pour l'Europe,* Parizo, Seuil, 2003 p. 143.

13 ĵurnalo Le *Monde* 20-an de septembro 2003 kaj 3-an de julio 2004 kaj dokumento titolita « Ni verduloj ali-europaj » subskribita far la listkapoj de verdula partio okaze de balotoj de la 3-a de majo 2004.

14 ĵurnalo de Le *Monde,* 25-a-26-a de julio 2004.

15 ĵurnalo Le Monde, 20-a de septembro 2003.

16 ĵurnalo Le Monde, 20-a de julio 2004.

17 ĵurnalo Le Monde, 3-a de juliot 2004.

18 Dokumento titolita « Ni verduloj ali-europaj » subskribita kar la listkapoj de verdula partio okaze de balotoj de la 3-a de majo 2004.

19 Martine Aubry, en ĵurnalo Le Monde, 6-an de juliot 2004.

20 Annick Lepetit, parol portanto de Socialista Partio ( francio), ĵurnalo *L'Humanité,* 22-a de junio 2004.

21 Balligand, Migaud, Valls, ĵurnalo *Libération, 2-an de julio* 2004.

22 Komunikaĵo de la 13-a de junio 2003 subskribita far Pervenche Berès, Olivier Duhamel kaj Jacques Floch.

23 ĵurnalo *La Croix,* 8-an de novembro 2003.

24 infomrad-elsendo jela 8-a horo de la radiostacio France Inter, la 10-an de decembro 2000. Mme Guigou uzis tiun komparon : *« Tiu , kiu poseda aŭtomobilon ne bezonas scii kiel funkcias la motoron »*

**Pri ĉiu paĝo vi trovu maldekstre referencojn cititajn en la supra kritiko, kiuj validis en teksto de junio 2004 , kaj dekstre la referencojn validajn en la lasta versio de la dokumentoj pri projekto de europa Konstitucio**

paĝo 8 :

| | |
|---|---|
| I-5 bis | I-6 |
| I-4 | I-4 |
| III-18 | III-133 |
| III-65 | III-172 |
| III-170 | III-269 |
| III-178 | III-277 |
| III-137 | III-239 |
| III-216 | III-314 |
| I-1,2 | I-1,2 |
| I-57 | I-58 |
| IV-4,1 | IV-440,1 |
| I-8 | I-10 |

paĝo 9 :

| | |
|---|---|
| I-31,2 | I-32,2 |

paĝo 10 :

| | |
|---|---|
| II-10 | II-70 |
| I-51,1 | I-52,1 |

paĝo II :

| | |
|---|---|
| I-51 | I-52 |

paĝo 12 :

| | |
|---|---|
| I-1 | I-1 |
| I-5 | I-5 |
| I-5bis | I-6 |
| I-4 | I-4 |
| I-3,2 | I-3,2 |
| II-Préambule | idem |
| II-51 | II-III |
| II-52 | II-112 |
| III-69 | III-177 |
| III-70 | III-178 |
| III-77 | III-185 |
| I-3,3 | I-3,3 |
| III-71 | III-179 |
| I-29,3 | I-30,3 |
| III-80 | III-188 |
| I-29,2 | I-30,2 |
| III-73 | III-181 |

paĝo 13 :

| | |
|---|---|
| I-2 | I-2 |

paĝo 14 :

| | |
|---|---|
| I-25 | I-26 |
| I-46,4 | I-47,4 |
| I-32 | I-33 |

paĝo 15 :

| | |
|---|---|
| I-26,1 | I-27,1 |
| I-25 | I-26 |
| I-9,3 | I-II,3 |
| I-23,5 | I-24,6 |
| I-49,2 | I-50,2 |
| I-19,1 | I-20,1 |
| I-26,1 | I-27,1 |

paĝo 16 :

| | |
|---|---|
| III-243 | III-340 |

paĝo 17 :

| | |
|---|---|
| I-25,1 | I-26,1 |
| I-25,7 | I-26,7 |

paĝo 19 :

| | |
|---|---|
| I-7 | I-9 |
| III-103 | III-209 |

paĝo 20 :

| | |
|---|---|
| II-15 | II-75 |
| II-34 | II-94 |
| II-35 | II-95 |
| I-4 | I-4 |
| III-71 | III-179 |
| III-70 | III-178 |
| III-76,2 | III-184,2 |

paĝo 21 :

| | |
|---|---|
| III-104 | III-210 |
| III-98 | III-204 |
| II-51 | II-III |
| II-52 | II-112 |

paĝo 22 :

| | |
|---|---|
| II-36 | II-96 |
| III-6 | III-122 |
| III-55 | III-166 |
| III-56 | III-167 |

paĝo 23 :

| | |
|---|---|
| III-136 | III-238 |

paĝo 24 :

| | |
|---|---|
| I-40,2 | I-41,2 |
| I-40,7 | I-41,7 |
| I-40,3 | I-41,3 |

paĝo 25 :

| | |
|---|---|
| I-5,1 | I-5,1 |
| III-62 | III-171 |
| III-104 | III-210 |
| I-II | I-12 |
| I-12 | I-13 |

paĝo 26 :

| | |
|---|---|
| III-45 | III-156 |
| III-217 | III-315 |
| III-216 | III-314 |
| I-12 | I-13 |
| III-6 | III-122 |

paĝo 27 :

| | |
|---|---|
| IV-7,3 | IV-443,3 |
| I-5bis | I-6 |
| IV-7bis | IV-444 |
| IV-7ter | IV-445 |

paĝo 28 :

| | |
|---|---|
| III-325 | III-419 |
| I-II,1 | I-12,1 |
| I-12,2 | I-13,2 |
| III-322 | III-416 |

paĝo 30 :

| | |
|---|---|
| IV-8 | IV-447 |

paĝo 31:

| | |
|---|---|
| III-97 / 102 | III-203/ 208 |
| III-103 / 115 | III-209 / 219 |
| III-II6 / 120 | III-220 / 224 |
| III-121 / 128 | III-225 / 232 |
| III-129 / 131 | III-233 et 234 |
| III-132 | III-235 |
| III-133 / 143 | III-236 / 245 |
| III-144 + 145 | III-246 + 247 |
| III-146 / 156 | III-248 / 255 |
| III-179 | III-278 |
| III-181 | III-280 |
| III-181bis | III-281 |
| III-182 + 183 | III-282 + 283 |